

Esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

110-a jaro • n-ro 1312 (4) | Aprilo 2017

Turismo kaj evoluo:
karavanaj vojoj al
Seulo:


du karavanoj al la 102-a
Universala Kongreso de
Esperanto • 84

Ulrich Lins pri la
historio de
*La danĝera
lingvo* • 77

Strategia
prioritato de
la Esperanto-
movado:
reta esperantista
infrastrukturo • 87



Niaj pasintjaraj eldonaĵoj



La danĝera lingvo

Studo pri la persekutoj
kontraŭ Esperanto

Ulrich Lins. Nova, plene reviziita historio pri la atakoj kontraŭ la E-movado, precipe sub Hitler kaj Stalin, sed ankaŭ en la cara Ruslando kaj la orienta Azio.
Rotterdam: UEA, 2016. Ilustrita.
375+24p. 19cm. € 18,00.

Fundamento de la homaj rajtoj

M. Fettes, M.R. Uruña. Entenas "Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj", "Internacia Pakto pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj" kaj "Internacia Pakto pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj".
Rotterdam: UEA, 2016.
96p. 15cm. € 6,90.



Internacia Kongresa Universitato 2016, 69-a sesio

Red. José Antonio Vergara kaj Alexandre André. Prelegoj de B.-A. Wickström, A. Wandel, J. Alcade, J.A. Vergara, So Gilsu, O.E. Raola, M. Fettes, H.M. Maitzen, A. Striganova.



Rotterdam: UEA, 2016. Ilustrita.
124p. 30cm. € 18,00.

Ĉe la libroservo de UEA, triona rabato por samtempa mendo de minimume tri ekzempleroj de la sama titolo sendotaj samtempe al la sama adreso.

Prilingve en Nitro

politike, historie, teorie, instrue



Fakaj prelegoj prezentitaj kadre de la 101-a Universala Kongreso de Esperanto

Prilingve en Nitro, politike, historie, teorie, instrue

Red. Stanislav Košecký. Fakaj prelegoj prezentitaj kadre de la 101-a Universala Kongreso de Esperanto. Rotterdam: UEA, 2016. Ilustrita. 230p. 25cm. € 17,70.

Edmond Privat

VIVO DE ZAMENHOF



UEA

Okaze de la centjariĝo de la morto de L.L. Zamenhof aĉetu, ĉe la libroservo de UEA,

Vivo de Zamenhof

de Edmond Privat

kun triona rabato sendepende de kvanto dum la tuta aprilo.
Plena prezo: € 7,50. Rabatita prezo: € 5,00.
Aldoniĝas la kutimaj imposto kaj sendokostoj.



Esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908
de Hector Hodler (1887-1920).

Misio:

Kvazaŭ anteno kaptanta la tendencojn, la ardon,
la aspirojn de la esperantoj ĉiulande, la revuo
Esperanto prezentu aktualan, interesan, inspiran
bildon pri la agado kaj strategio de UEA kaj pri la
evoluo de Esperanto en monda skalo.



Redaktoroj: Dmitrij Ševčenko, Anna Striganova
Korektisto: Rob Moerbeek

Adreso de la Redakcio:
Revuo Esperanto
Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ
Rotterdam, Nederlando
tel.: +31 10 436 1044
faks.: +31 10 436 175
<http://revuoesperanto.org>
revuo.esperanto@gmail.com

Aperas: en ĉiu monato krom aŭgusto.

Legata en 120 landoj.

Voclegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande (EUR 41);
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 4,00.

Ĝenerala Direktoro: Veronika Poór

Anonctarifo (EUR):

1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300,
1/8 p. 165, 1/16 p. 90.

Movada rabato 50%.

Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas double.

Rabato por tuja ripeto 20%.

Anoncojetoj: 1€ por ĉiu vorto. Mendo ĉe la CO.

Transpagaj informoj:

Banko: ING, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
Bankokonto: IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64,
BIC/SWIFT: INGBNL2A
(Universala Esperanto-Asocio en
Rotterdam, Nederlando)
PayPal: financoj@co.uea.org



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.
+31-10-436-1044 +31-10-436-1751
uea@co.uea.org www.uea.org



77

Ulrich Lins pri la historio de *La danĝera lingvo*


Ĵus antaŭ la Nitra UK aperis nova
eldono de *La danĝera lingvo*. Ĉi tiu libro
jam havas sian historion, pri kiu tie ĉi
skribas ĝia aŭtoro.



84

Turismo kaj evoluo: karavanaj vojoj al Seulo

Ĉi-jare al la 102-a Universala Kongreso
estas planataj kelkaj karavanoj. Inter-
tempe tio ankaŭ kongruas kun la
kongresa temo – "Turismo kaj evoluo:
Vojoj al daŭripovo". La redakcio esploris
du itinerojn de tiuj planataj vojaĝoj.



87

Strategia prioritato de la Esperanto-movado: reta esperantista infrastrukturo

Multaj neesperantistaj projektoj kaj
organizoj uzas Esperanton por di-
versaj propraj celoj. Sed ni ne devas
forgesi ankaŭ pri nia propra es-
perantista infrastrukturo, kiu estas
strategia prioritato por la kvanta kaj
kvalita kresko.



91

Ĉu mi povas helpi vin?

Faka agado gravas. La 1-a Studsesio
pri Medicino kaj Sano en Interkultura
Centro Herzberg. Pri la aranĝo rakontas
Frank Lappe.

Enhavo

Malferme	76
Novaj redaktoroj Anna kaj Dima	
Malkontinentigismo	78
18-litera titolo por analizi!	
Venontaj renkontiĝoj	80
Kalendaro de la baldaŭaj eventoj	
Recenzo	82
La legenda legenda biblio de Izrael Lejzerowicz	
Unesko	83
Nemateriaj heredaĵoj	
Rete	88
Subteno akumulita por Amikumu	
UEA	88
Oficiala Informilo	
Afriko brilas	89
Pri novaj radikoj (neologismoj) en la eveda lingvo	
Recenzo	90
<i>La Morto en Venecio</i>	
Interese	92
Walter Klag pri Esperanto-Mono	
Tajvano	93
Neforgesebla, fruktodona kaj internacia Komuna staĝo de koreaj kaj tajvanaj esperantistoj	
Kalejdoskopio	94
Mallonge pri tio, kio okazas en la Esperanto-mondo	
Statistiko de UEA	95

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto: D-ro Mark Fettes,
2658 E 21st Av, Vancouver BC, Kanado.
VSM 2W1; +1-778-928-4489
mtfettes@sfu.ca

Vicprezidanto: S-ro Stefan MacGill,
Pannónia u. 30.1.6, HU-1136 Budapest,
Hungario.
+36 (1) 349 5207
stefan.macgill@gmail.com

Ĝenerala Sekretario:
S-ro Martin Schäffer,
+52 596 924 5144 +49 30 69 20 48 461
esperantst@gmail.com

Membro: D-ino Sara Spanò,
Tal 28, 80331
München, Germanio
mariorasaria.spano@gmail.com

Membro: S-ro Emilio Cid,
R. Julio Prestes 904, 11390-150 São
Vicente – SP, Brazilo +5513-99778-
7367 cid.emilio@gmail.com

Membro: S-ro LEE Jungkee,
401 dong 301 ho Dongpyun-ro 135,
Dongan-ku, 431-907, Anyang-si,
Kyungki-do, Korea Resp. +82 10 3340
5936 esperanto@saluton.net

Observanto de TEJO: S-ro Michael
Boris Mandirola kaj s-ino Arina Osipova.

Observanto de ILEI:
S-ino Mirejo Grosjean

**La estraranoj respondecas pri la jenaj
difinitaj aspektoj de la asocia politiko:**
D-ro Mark Fettes: Strategio, Kunordigo,

Statuta Reformo, Esploro kaj
Dokumentado, Faka kaj Scienca Agado.

Stefan MacGill: Instruado, Jaro de
la Lernanto, Meza Oriento kaj Norda
Afriko, Rilatoj kun Membro-Organizoj kaj
Gemelaj Urboj, revuo Esperanto

Martin Schäffer: Financoj, Administrado,
Retejoj kaj Retlistoj, Ameriko.

Emilio Cid: Informado, Amikoj de
Esperanto kaj Zamenhof-Jaro.

LEE Jungkee: Azio, Afriko kaj
Esperanto-Centroj.

D-ino Sara Spanò: Eksteraj
Rilatoj, Aktivula Maturigo, Eŭropo,
Terminologio, Kulturo kaj Kongresoj.

Pli detale ĉe:
<http://www.uea.org/asocio/estraro>

Malferme

■ Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

Karaj legantoj, vi tenas en la manoj novan numeron de la revuo *Esperanto*. Tio estas la 1312-a numero, sed nur la unua por ni, kiel redaktoroj. Kompreneble ni sentas ioman eks-citon. Multaj el vi subtenis nian kandidatigon ĉu en la sociaj retoj, ĉu per retmesaĝoj, ĉu en privataj interparoloj. Dankegon al vi ĉiuj, sen via helpo la tuto ne eblus!

Aparte ni dankas la Estraron de UEA kaj kunlaborantojn de la CO ne nur pro la decido elekti nin kiel redaktorojn, sed ankaŭ pro la multflanka sincera kaj sindona helpo dum la preparo de tiu ĉi numero. Nun ni vere sentas nin parto de la teamo, kiu povas efike labori kune, rapide kaj kvalite solvi eĉ la plej komplikajn taskojn.

Kiel vi povis legi en la Gazetaraj Komunikoj de UEA, okazas la unuan fojon en la historio de la revuo, ke ĝin oficiale redaktos samtempe du redaktoroj. Ni tre ĝojas pri tio, ĉar ni ĉiam ĉion faras kune, ankaŭ en la profesia agado. Niaj personaj kaj profesiaj interesoj multe kongruas. Ekzistas proverbo, ke “unu kapo estas bona, sed du kapoj estas multe pli bonaj”.

Antaŭ ni staras ne facila tasko, kiu komplikiĝas ankaŭ pro la novaj defioj al la Esperanto-movado kaj la moderna mondo ĝenerale. Sed ni ne timas tion. Ni certas pri niaj fortoj kaj sentas grandamasan subtenon.

Malgraŭ opinioj de skeptikuloj, Esperanto havas propran kulturon, kiu estas unika kaj internacia. Ĝi ĉiutage generas amason da informoj: afiŝojn en sociaj retoj, bildojn, fotojn, tekstojn, librojn, kantojn, filmojn kaj multon



alian. En tiu ĉi lavango aperas amasego da bonkvalita kaj interesa enhavo. Se vi havas ion por komuniki, sendu vian kontribuon al la redakcio. Via artikolo povus aperi en la revuo aŭ en ĝia retejo. Konstanta informado pri la diversaj eroj de la Esperanto-vivo kaj kulturo estas vere gravaj por nia vivanta lingvo.

Tre gravas integriĝo de la tradiciaj paperaj eldonaĵoj en la interretan mondon. Sen tio nun ne eblas: aŭ integriĝi, aŭ stagni kaj poste finfine malaperi. Tio ne signifas, ke necesas detrui tion, kio estis kreata dum la jardekoj. Necesas plibonigi kaj modernigi. Bonaj multjaraj tradicioj kuniĝu kun la nuntempo kaj modernaj teknologioj, kreante ion tute novan.

Ekde nun vi povas ĝui ankaŭ retejon de la revuo. En ĝi vi povas trovi ne nur informojn pri la revuo, sugestojn por la kontribuantoj, sed ankaŭ multajn materialojn, kiuj ne aperis en la papera kaj PDF-forma *Esperanto* pro la limigoj de la spaco.

Revuoesperanto.org, kune kun paĝoj de la revuo en la sociaj retoj estas la sistemo, kie la legantoj, redakcio kaj aŭtoroj povas komuniki kaj interŝanĝi opiniojn. Ni esperas, ke tio estos bona loko, kiu helpas al ni kunkrei bonegan



virtualan kunvenejon por esperantistoj. Eventuale tie eblos ne nur kontakti la redakcion, publike esprimi opiniojn, sed ankaŭ iĝi aŭtoro de la enhavo, anonci kaj raportoj pri E-aranĝoj.

Ĉi tiu retejo rapide evoluas kaj ni esperas, ke ĝi fariĝos moderna esperantista amaskomunikilo.

Ni esperas, ke la revuo plaĉos al vi kaj ne estos teda legaĵo. Ni ĉiam estas malfermaj por viaj sugestoj, komentoj kaj kritiko.



**Nova retejo de
la revuo *Esperanto***

<http://revuoesperanto.org>

Pri la historio de *La danĝera lingvo*

■ Ulrich Lins

Ĝus antaŭ la Nitra UK aperis nova eldono de *La danĝera lingvo*. Ĉi tiu libro jam havas sian historion, pri kiu tie ĉi skribas ĝia aŭtoro.

Iun tagon, eble en la somero de 1965, mi ekkonsciis, ke baldaŭ pasos tridek jaroj post la nazia malpermeso de la Esperanto-movado en Germanio. Jen la instigo por mi esplori tiun temon: la malesperan kaj fine malsukcesan batalon kontraŭ la malpermeso. La germanaj esperantistoj delonge sciis, ke Hitler en *Mein Kampf* kondamnis Esperanton. La nazioj prenis potencon komence de 1933, kiam jam daŭris la preparoj por la 25a Universala Kongreso en Kolonjo.

Sub la titolo „Esperanto dum la Tria Regno“ aperis longa artikolo mia en *Germana Esperanto-Revuo* (1966/67). Multaj legantoj reagis pozitive, laŭdante ke finfine iu traktis, dudek jarojn post la pereco de la nazia reĝimo, la sorton de la Esperanto-movado en la Tria Regno. Sed venis ankaŭ reagoj malpli aprobaj. Ilin esprimis esperantistoj, kiuj partoprenis en la klopodoj savi la movadon kaj mildigi la reĝimon per emfazado de sia „patriota fideleco“. Ili min riproĉis, ke mi junulo anstataŭ kompreni la dilemon, en kiu troviĝis la esperantistoj, facilanime kritikis ilin pro ilia sinadaptado kaj kelkfoje eĉ laŭdo de la nazia reĝimo.

Tia sindefendo de homoj, kiuj por transvivi faris cedeojn parte kompromitajn, estis bone konata fenomeno

en la tiama germana socio. Sed mi ne antaŭvidis, ke ankaŭ inter esperantistoj estos rezisto kontraŭ malkaŝa traktado de la propra historio.

En mia studado de historio mi ekkonatiĝis ankaŭ kun aliaj tempoj kaj temoj, ol la germana historio kaj la naziismo. Mi lernis pri la batalo de politikaj ideologioj, pri socialismo, faŝismo ktp. Historiistoj vigle diskutis pri la demando kiel kompari la malamikajn ideologiojn – ĉu eblas konstati komunajn trajtojn inter la faŝismo kaj naziismo unuflanke kaj la sovetia socialismo, do leninismo kaj stalinismo aliflanke. Multaj argumentis, ke, kvankam la ideologioj estis malamikaj, ili pro sia simileco rilate forpuŝon de demokratio, submetiĝon al gvidanto kaj militecan mobilizon de la amasoj povas esti kune karakterizataj per la nocio totalismo. Laŭ tiu difino do la naziismo kaj la stalinismo estas subformoj de totalismo. Hitler kaj Stalin ambaŭ estis diktatoroj tipaj por tiu totalismo; ili respondecis pri subpremo kaj amasmurdo tute senprecedencaj en la historio de la homaro.

Dum daŭris la historiista diskuto, Ivo Lapenna proponis al mi kontribui al la preparata verko *Esperanto en perspektivo* per ĉapitro pri persekutoj kontraŭ Esperanto. Tio instigis min esplori, kiugrade esperantistoj suferis krom en la Hitlera Germanio ankaŭ sub aliaj reĝimoj, precipe tiu de Stalin en Soveta Unio.

Estis la japano Kurisu Kei, kiu enkondukis min en la komplikan temaron de Esperanto kaj socialismo. Kiel juna komunisto li entuziasme

korespondis en Esperanto kun sovetiaj kamaradoj. Mi mem provis starigi kontakton kun maljunaj sovetiaj esperantistoj, sed tute malsukcesis, ĉar ili aŭ ne respondis aŭ limigis sin al banalaĵoj. Verŝajne ili, mem spertinte persekuton, timis havi Esperantan korespondadon kun okcidentano.

En la eldonejo l'omnibuso (Kioto) aperis en 1973 provizora rezulto de miaj esploroj. La modesta libreto havis la titolon *La danĝera lingvo: Esperanto en la uragano de persekutoj* – la praeldono de la verko, kies historion mi tie ĉi resumas; ĝia enhavo estas esence identa kun la ĉapitro en *Esperanto en perspektivo* (1974). Ambaŭ, la libreto kaj *Esperanto en perspektivo*, trovis vojon tra la t.n. Fera Kurteno. Tiamaniere multaj esperantistoj en la socialismaj landoj, precipe en Soveta Unio, unuafoje eksciis la dimension kaj la kialojn de la subpremo de Esperanto en stalinismo.

En 1983 la prilaborita Esperanta versio estis preta. UEA pretis publikigi ĝin. Sed estis obstakloj. Eksciinte, ke estas preparata *Esperanto en perspektivo*, la orienteŭropaj landaj asocioj en marto 1973 protestis al la estraro de UEA kontraŭ la plano meti en tiun verkon priskribon de la persekutoj de Esperanto en Soveta Unio. Ili asertis, ke tio malutilos al la movado en orienta Eŭropo. La tendenco prisilenti la persekutojn rilatis al la pli vasta demando kiel trakti la heredaĵon de Stalin. La reĝimoj ja distancigis sin de stalinismo, sed preferis ne multe aŭ tute ne malkaŝi detalojn pri la teruraj krimoj, kiuj estis farataj en la nomo de socialismo. Movadaj gvidantoj partoprenis, eĉ se malvolonte, en la tabuado de la temo pri persekutoj.

UEA ne cedis en 1973. Dek jarojn poste la tem-pritrakto vastiĝis de ĉapitro al plena libro. Kion fari? Por ne provoki la orientajn asociojn UEA faris lertan aranĝon: ĝi petis la germanan eldonejon Bleicher, kiu jam konsentis aperigi germanan version de mia libro, ke ĝi alekstere prezentiĝu kiel eldonisto de *La danĝera lingvo*.

Neniu povis tiutempe antaŭvidi, ke en Soveta Unio en 1985 la potencon akiros la reformemulo Miĥail Gorbaĉov. Gazeto en Odeso en aprilo 1988 malobservis tabuon: ĝi menciis la persekutojn kontraŭ la Esperantomovado kaj postulis, ke oni redonu honoron al mortigitaj esperantistoj. Kiam mia libro aperis en julio 1988, jam preskaŭ forfalas la konsideroj, pro kiuj UEA decidis kaŝi sin malantaŭ la eldonejo Bleicher.

El Soveta Unio venis novaĵoj, kiuj mirigis la tutan mondon. Ankaŭ la malgrandan esperantistan mondon kaptis surprizoj. En aprilo 1989 la granda fremdlingva eldonejo Progreso en Moskvo decidis publikigi represon de la Bleicher-eldono. Nur du-tri jarojn, post kiam UEA pro timo de moskva kolero hezitis propranome eldoni mian libron, tiu sama libro aperis ĝuste en Moskvo.



En julio 2016 aperis nova, reviziita eldono de *La danĝera lingvo*, nun tute oficiale eldonita de UEA. Kio estas nova en ĝi, tion mi iom klarigis aliloke: <http://www.liberafolio.org/2016/09/26/novaj-detaloj-pri-persekuto-de-esperantistoj-trovitaj>.

Post la japana traduko, farita de Kurisu Kei (1975), sekvis tradukoj

en aliajn lingvojn: en la germanan, italan, rusan, litovan kaj korean. Kaj surbaze de la ĵusa nova eldono de *La danĝera lingvo* Humphrey Tonkin faris tradukon en la anglan, kiu ĵus aperis.

(Pli ampleksa versio de tiu ĉi artikolo aperis en *La Revuo Orienta*, marto kaj aprilo 2017.)

Opinio

■ Stefan MacGill

Jen 18-litera titolo por analizi! Ni aŭdis pri la bezono por malkoloniismo, kiu daŭris jarcenton kaj argumenteble eĉ ne venis al fino. Lastaj vojaĝoj konvinkis min, ke inter la sekvaj paŝoj por nia movado estas malkontinentigismo. La tradicia mondo juĝas la nombron da kontinentoj kvin, dum usonanoj kaj kunvojaĝantoj, kun iluzioj pri mem-

graveco, opinias, ke sep. Sed tiuj juĝoj ne ege helpas al ni. Finfine, tiu kvin-kontinenta devigo estis kreita en Eŭropo – tiu pendanta apendico en la okcidenta ekstremo de Eŭrazio. Tiu marĝena Eŭropo arogis al si la rajton dishaki la mondon en kontinentojn, samkiel ili dishakis Afrikon en naciŝtatojn, senkonsidere al surlokaj lingvoj, kulturoj, etnoj kaj sentoj.

La E-komunumo povos alrigardi la mondon pli inteligente por krei

pli daŭripovajn kaj pli oportunajn dividojn – esenca demando estas kiugrade UEA sekvas aŭ spronos tiujn reformojn. Jen unu modesta propono por stimuli debaton, ne por trudi antaŭbakitan solvon. Anstataŭ la nunaj kvin kontinentoj, kaj la neidentaj kvin ĝisnunaj grupiĝoj de UEA, proponblas skemo por dek mondregionoj, kiuj ne nepre devas forigi niajn nunajn organizojn kaj kongresajn strukturojn.

Mondo-dividoj repripensataj. La sekvaj bildoj ne celas esti geografie tre precizaj, ĉar ne eblas kaj ne indas rigore devigi la limojn. La celo estas nur montri la nunajn kaj unu el plurajn eblajn pli justajn kaj utilajn dividojn.

Kontinentoj kvin – nuna skemo

Regionoj dek – eblo por estonto



Rimarku, kiel la limoj koncentras sin en la longitudoj de Eŭropo.



Regiono	Centro aŭ fokuso	Komuna Lingvo	Notoj
Ameriko Norda	Usono, Kanado	Angla, hispana, franca	Memzorgantoj.
Ameriko Centra	Meksiko, Nikaragvo, Kubo	Hispana	Granda potencialo.
Ameriko Suda	Urugvajo, Argentino?	Hispana	Brazilo, Hispanio helpu.
Afriko Okcidenta	Benino, Togolando...	Franca kaj div.	Plej longa historio.
Afriko Orienta	Tanzanio, Kenjo...	Svahila, angla, div.	Nun kreskanta.
Afriko Suda	Sud-Afriko aŭ ... ?	Diversaj	Ne nur Sud-Afriko!
Azio Norda	Ĉinio, Koreio, Japanio	Diversaj	Plej longa historio.
Azio Suda	Nepalo, Barato, Indonezio...	Diversaj	Kun Oceanio.
Eŭropo	Bruselo, Strasburgo...	Teorie 25 +	Rilatoj kun EEU?
Mezoriento-Nordafriko	Pluraj kandidatoj	Araba kaj diversaj	Komisiono MONA jam ekzistas.

Pri **Ameriko**, en Norda Ameriko maturas la movado, kaj kie la du koncernaj landoj delonge kunlaboras. La kulturaj kaj ekonomiaj kondiĉoj inter nordo kaj sudo ege malsamas. Tiom grandas la regiono, ke indas doni atenton al la Centra Ameriko, disde la cetero de hispanlingvio. La propono ne detruas la eblon de la Kongresoj TAKE, sed fortigas la eblon por ekzemple Centramerikaj kongresoj. Tio portos la kongresan sperton al homoj, kiuj ne povas financi vojaĝon al pli foraj landoj, eĉ ene de Ameriko.

Pri **Afriko**, la rezolucio de la 6-a Kongreso specife pledis por pli regiona laborado; tio okazis kun la subteno de la Afrikaj Komisiono kaj Oficejo, kiuj pluvivos. Tiu kongreso tamen montras la dezirindon por pli etregiona laboro. Povis alveni al Bunda 11 eŭropanoj, sed nur du kongresanoj el landoj ekster la Orienta Afriko, kaj ili estis agantoj de UEA kaj ILEI. Estas entuziasmo por aldono de regionaj kongresoj, sed demandebblas, ĉu samkvantas la organizaj kaj financaj fortoj. Tio same validas pri la deziro por regionaj oficejoj. Eksterdube, multaj disvastigaj kaj instruaj agadoj profitus de regiona kunlaboro, por ke ne ĉio dependu de la tutafrikaj komisiono kaj oficejo. Sendube, la rolo de UEA devos fokusi sin al la tutafrika nivelo.

Pri **Azio**, la propono ne devigu la morton de KAEM, kiu bone funkcias, kaj povos daŭre kunordigi la agadojn en la tuta Azio, kaj daŭre indas organizi laŭ la serio Aziajn Kongresojn. Laŭ la agado-kondiĉoj la norda kaj la suda Azio havas siajn ege apartajn trajtojn kaj obstaklojn; la kontinento tiom vastas, ke ĝi nepre meritas du organizojn. Kelkaj landoj povus egale aparteni al norda aŭ suda Azio (mi pensas precipe pri Vjetnamio kaj Filipinoj), sed ili mem decidu kaj agu laŭprefere aŭ laŭokaze. Oceanio tenu aktivajn rilatojn kaj kun KAEM kaj kun la Sudazia regiono, rekone al la delongaj kunlaboroj inter Aŭstralio, Nov-Zelando kaj Indonezio.

Pri **Mez-Oriento kaj Nord-Afriko** (MONA), la amplekso de la komisiono iĝis pli reprezenta, la Mezoriantaj Kunvenoj atingas novajn landojn, kaj bazaj laboroj ekzistas por vastigi la gamon de kursoj kaj informoj akireblaj en la araba lingvo. Povos esti, ke la Mezoriantaj Kunvenoj daŭrigos siajn kreskojn ĝis la punkto, ke iam ili iĝos regiona kongreso.

Pri **Eŭropo** estus utile pli klare distingi inter la roloj de la Komisiono de UEA kaj la agado de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU). Sufiĉas lasi al EEU organizi kontinentajn kongresojn, UEA koncentru sian atenton al la eŭropaj landoj ekster EU kun tre malforta movado.

En la marta numero de nia revuo aperis artikolo, 'Universaliraj Kongresoj', kiu esploras tre ligitan temaron, specife el la vidpunkto de renovigo de niaj translimaj kongresoj kaj la ligitaj organizaj, financaj kaj diskonigaj implicoj. La celo de ĉi tiuj du artikoloj estis startigi la debaton pri pli ekvilibra propono de niaj kongresoj kaj pri pli utila disdivido de la mondo, ĉio por kontribui al la slogano: 'Pensu globe, agu loke'. En nia monda kunteksto 'loke' povas signifi en plurlandaj regionoj, ene de la tradiciaj kontinentoj. Pripensu kaj diskutu!

**Sekvu
la revuon Esperanto
en sociaj retoj:**



<https://www.facebook.com/esperantorevuo>



https://twitter.com/revuo_esperanto

Venontaj renkontiĝoj


Ni listigas nur kelkajn Esperanto-aranĝojn, kiuj estas planataj por la periodo aprilo-julio 2017.

Pri ĉiuj informoj de eventoj respondecas nur la organizantoj mem.

Plenan kaj aktualan liston de konataj E-aranĝoj vi povas trovi ĉe Internacia kalendaro:

www.eventoj.hu

Aprilo



10–17: Printempa Semajno Internacia (PSI) – en Essen, Germanio. Printempa, familia kunveno kun ekskursoj, prelegoj kaj kursoj por plenkreskuloj kaj infanoj, malferma por ĉiuj generacioj.

Inf.: Germana Esperanto-Asocio, Katzbachstr. 25, DE-10965 Berlin, Germanio.

✉ petra.dueckershoff@esperanto.de

12–18: 41-a Internacia Junulara Festivalo – en Castione della Presolana, Bergamo, Italio. Ĉu vi volas viziti la belajn montarojn de la regiono Lombardio en vilaĝo sufiĉe eta por esti trankvila kaj sufiĉe maleta por havi ĉion bezonatan? Kaj fari tion loĝante en ĉarma kaj komforta feridomo, malmulte pagante kaj tre multe amuziĝante? Do venu al la Internacia Junulara Festivalo 2017, la plej fama junulara Esperanta renkontiĝo en Italio! La ĉi-jara temo rilatas al internacia paco kaj milita kaj religia. Estas grave kaj rimarkinde, ke la 14-an de aprilo estos la centjara datreveno de la morto de Zamenhof, kaj do speciala tago estos organizita honore al li. Inf.: Informitale, Itala Esperanto-Federacio ✉ fei@esperanto.it, Itala Esperantista Junularo ✉ iej@esperanto.it

16–20: AMO-seminario (Aktivula Maturigo) – en Baugé, Francio. Kiel modernigi la instruadon de Esperanto per la novaj teknikajoj? – kun Sara

Spanò kaj Stefan MacGill. Inf.: Esperanto-Kastelo Greziljono, MCE Grésillon, FR-49150 Baugé-en-Anjou, Francio.

✉ kastelo@gresillon.org

29: 46-a Malferma Tago de la CO de UEA – en Roterdamo, Nederlando.

Taga temo: La Zamenhof-Jaro kun renomaj prelegantoj. Seminario pri Informado en la 30-a de aprilo. En la libroservo ĉio kun sesona rabato; specialaj ofertoj; bazaro de e-ĉaĵoj; senpaga loterio; kafo kaj teo senpagaj. UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

✉ uea@co.uea.org

Majo

3–5: 50-a Esperanto-Seminario, Nagoya – en Nagoya, Japanio. Tutlanda E-seminario kun dek-hora leciono kaj ceteraj programeroj. Inf.: Japana Esperanto-Instituto (JEI), Tokyo-to Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3 JP-162-0042 Japanio. ✉ sem@jei.or.jp



16–23: Kongreso de IFEF, Internacia Fervojista Esperanto-Federacio – en Colmar, Francio. Jara kongreso de IFEF kun fakaj kunsidoj kaj ekskursoj en la orient-Francia regiono Alzaco ĉe la limoj inter Francio, Germanio kaj Svislando. Inf.: André Grossmann, 5 rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim, Francio.

✉ laurent.vignaud@free.fr



19–21: Brita kaj Skota Kunkongreso de Esperanto – en Edinburgo, Skotlando. Esperanto-Asocio de Britio kaj Esperanto-Asocio de Skotlando kunmetas siajn naciajn kunvenojn en unusolan kunkongreson en 2017! Edinburgo gastigos la plej grandan Esperanto-kongreson en Britio, la 98-an britan kaj 112-an skotan. Transmaraj vizitantoj ne devas pagi kotizon. Inf.: Tim Owen

✉ tim.owen@esperanto.org.uk



Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj

Europejski Festival Piosenki Esperanckiej

20–21: Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj – en Wrocław, Pollando. La Festivalo okazas ĉiujare en majo en du kategorioj: 1. koruso aŭ ensemblo/ 2. solisto. Ĉiu partoprenanto kantas du kantojn: unu en Esperanto, la alian en sia nacia aŭ fremda lingvo. Pritaksataj estas nur Esperantaj kantoj. La festivalon patronas la urbestro de Wrocław. La premiitoj ricevos diplomojn kaj pokalojn kaj ĉiuj partoprenantoj ricevos diplomon pro la partopreno. Inf: Malgorsia Komarnicka ✉ informado.eo@gmail.com

25–28: AMO LIMA – en Les Brenets, Svislando. Aktivula maturigo por instruistoj kaj neinstruistoj. Gvidos ĝin

K. Kováts, M. Molnár kaj M. Grosjean.
Inf.: ILEI UEA, Mireille Grosjean, cp 9,
CH-2416 Les Brenets, Svislando.

✉ mirejo.mireille@gmail.com

Junio

2-5: 94-a Germana Esperanto-Kongreso kun EEU-Kongreso – en Freiburg. Temo: Milito kaj Paco. Riĉa kulturprogramo, sep ekskursoj, Zamenhof-memorifesto okaze de la 100-a morto-datreveno.

<https://www.esperanto.de>

15: 52-a Brazila Kongreso de Esperanto – en Sorriso/MT, Brazilo.

Brazila Kongreso de Esperanto (BKE) estas nacia kunveno de membroj de Brazila Esperanto-Ligo kaj brazilaj esperantistoj ĝenerale, kiu okazas ekde 1907. Depost 1984, tiu serio de kongresoj fariĝis ĉiujara. Inf.: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, Brasília - DF, CEP 70.393-902 Brazilo. ✉ bel@esperanto.org.br



23-25: 76-a Hispana Esperanto-Kongreso – en Teruel, Hispanio. La Hispana Kongreso de Esperanto estas unu el la plej gajaj aranĝoj de la eŭropa movado. En 2017 ĝi

okazos en relative nekonata sed tre bela urbo, Teruelo, inter Zaragozo kaj Valencio. Dum la jaro 2017 Teruel solenas la 800-an datrevenon de la popola legendo konata kiel "Amantoj de Teruel". La kongreso koincidas kun tiu celebrado, kaj do, la moto de la kongreso estas: "Teruelo, urbo de amantoj, amantoj de Esperanto". Inf.: Grupo Liberano de Teruelo, kaj Hispana Esperanto-Federacio.


✉ kongreso@esperanto.es

Julio

1-8: 53-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-53) – en Liepāja, Latvio. Diversnivela Esperanto-kursoj, enkonduka

kurso en la latvan lingvon, somera universitato, sankta meso en Esperanto, interkona, nacia kaj internacia vespero, duontagaj kaj tuttaga ekskursoj, kvizoj, filmoj, kantoj, dancoj k. a. aranĝoj. Inf.: Latvia Esperanto-Asocio, p.k. 150, LV-1050, Riga, Latvio.

✉ margarita.zelve@gmail.com



15-22: 50-a Kongreso de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) – en Busan, Korea Respubliko. El la programo: Interkona frandvespero, instruista trejnad, E-kursoj por komencantoj kaj komencintoj, prelegoj kaj atelieroj de konferencanoj, lingva festivalo, simpozio pri la konferenca temo, konferenca bankedo, distraj vesperoj, literatura kafejo, ekskursoj. Post la fermo, komuna trajnveto al la UK en Seulo. Inf.: Radojica Petrović, Bul. Oslobodjenja 36, RS-3200 Ĉaĉak, Serbio.

✉ radojica.petrovic.rs@gmail.com

15-23: Somera Esperanto-Studado, SES – Internacia renkontiĝo de interretaj Esperanto-lernantoj kaj aliaj komencantoj en la urbo Banská Štiavnica, Slovakio.



Vizitu vian propran domon
ĉe Nieuwe Binnenweg 176 en Roterdamo dum

MALFERMA TAGO

sabaton la 29-an de aprilo 2017 (10h00 - 17h00)

Taga temo:

La Zamenhof-Jaro
kun renomaj prelegantoj.
Seminario pri Informado
en la 30-a de aprilo 2017

- ★ En la libroservo ĉio kun sesona rabato
- ★ Specialaj ofertoj
- ★ Bazaro de e-aĵoj
- ★ Senpaga loterio
- ★ Kafo kaj teo senpagaj

Bonvenon!

Antaŭtagmeze lernado, posttagmeze ekskursoj, prelegoj, ludoj, vespere koncertoj, filmoj, amuzado.

Inf.: Peter Baláž, ✉ petro@ikso.net

21-31: 39-a REF (Renkontiĝo de Esperanto-Familioj) – en Rudnik, Serbio. Komuna restado de familioj kiuj uzas Esperanton kiel unu el siaj hejmaj aŭ familiaj lingvoj. Varia programo, kiun aranĝas kaj plenumas la partoprenantoj mem – gepatroj kun infanoj: komuna kantado, skeĉoj, filmvesperoj, rakontvesperoj, koncertoj, plurtaga serĉado de fantomo, promenoj, ekskursoj, gepatraj interkonsiliĝoj, lokaj popoldancoj, sportoj teamaj kaj tandemaj, lingvaj kaj E-kulturaj atelieroj por infanoj kaj plenkreskuloj. Inf.: Radojica Petrović, Bul. Oslobodjenja 36, RS-3200 Ĉaĉak, Serbio.

✉ radojica.petrovic.rs@gmail.com



22-29: Universala Kongreso de Esperanto, UK-2017 – en Seulo, Sud-Koreio.

Ĉeftemo: "Turismo kaj evoluo: Vojoj al daŭripovo".

Retejo de UEA:

<http://www.uea.org/kongresoj>

29-5 (aŭgusto): SAT-kongreso – en Gimpo-Seulo, Sud-Koreio. 90-a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda. Inf.: Paz Hyunsoo JUNG No.301(3F), 356, Gwanggyo-hosu-Ro, Suji-Gu, Yongin-Si, Gyeonggi-do, Sud-Koreio (KR16940).

✉ paze23@gmail.com

La legenda legenda biblio de Izrael Lejzerowicz

■ Fernando Pita

Izrael Lejzerowicz: *El la "Verda Biblio"*. Eldonejo Libro-Mondo/Grafokom, Świdnik/Đurdevac, 2014 (4a eld), 63 p. Prezo ĉe UEA: € 9,00

Esperanta literaturo estas ja pli ol centjara, ni ĉiuj tion scias; tamen, pro disigeco de la legantaro, pro la persekutoj kontraŭ Esperanto, pro neglektemo de tiuj, kiuj ja devus gardi niajn beletrajn trezorojn, la kruda kaj kruela fakto estas, ke multo el nia originala literaturo estas ankoraŭ nekonata de esperantistoj. Malfeliĉe multaj verkoj el pasintaj jardekoj tute malaperas sub la polvo de bretaroj aŭ – kredo, mi jam vidis tion – estas vendataj kiel paperaĉo por recikligo. Do estas ja laŭdirinde ke kelkaj Esperantaj eldonejoj, kiel *Libro-Mondo*

“Ĉar pri ni mem la libro parolas, estus interese legi ĝin ja almenaŭ por koni nian propran historion: la kongresa etoso dum la intermilitaj periodoj, la akraj interorganizaj disputoj, la fiagoj kaj fiaskoj de tiuj, kiuj provis detrui kaj malstabiligi la movadon, kaj – malfeliĉe ankoraŭ aktuala – serioza kritiko al tiuj, kiuj konsideras sin eminentuloj.”

kaj *Grafokom*, sindediĉas al la laboro ree disponigi al novaj legantoj niajn klasikaĵojn, ĉar estas verkoj kies legado ĉiam nepras.

Inter tiuj nepraĵoj estas *El la "Verda Biblio"*, de Izrael Lejzerowicz, kies unua eldono estis publikigita en 1935. Kvankam ĝia teksto fariĝis deviga ĉeesto en ĉiuj antologioj de nia literaturo, tiu verk(et)o estas ank(or)aŭ unu el tiuj pri kiuj multaj personoj iam aŭdis, sed kiujn malmultaj ja legis. Malgraŭ tio, atestas la konatintecon de tiu verko la fakto ke la nuna, kvara eldono de tiu verketo, aperas nur sep jarojn post la tria, plivalorigita per vera pluso: KD, en kiu iam enregistriĝis la tuta libro en legado de Jerzy Fornal, dum la antologiaj sesioj de *radio-teatroj* promociitaj de Varsovia Vento. Vera historia dokumento! Nur pro tio, tiu reeldonado jam estus grava, sed tio estas ja detalo, ĉar la vera spirŝtela surprizo estas kontakti la tutan tekston el tiu “kuraĝa” verko.


Kuraĝa ĉar, se diversaj estas la manieroj verki beletran tekston, unu el la plej malfacilaj el ili estas tion fari pere de parafrazo: la legantoj ĝenerale taksos vian laboron rilate ankaŭ al la originalo. Se la fina rezulto estas bonega, oni ĉiam diros, ke la nura

talento de la verkisto estis bone elekti la parafrazotan tekston; se ĝi rezultigas mezkvalitan laboron, tiam la verkisto vere “atencis” kontraŭ la originalo, kaj produktis nuran malŝparon de papero. Tiel rezonante, oni ja povas imagi kiom da kuraĝo necesis al Izrael Lejzerowicz por verki sian libreton, ĉar li realigis parafrazon de nenio malpli ol la Biblio mem! Tiel li riskis esti konsiderata ne nur malbona verkisto, sed eĉ herezulo,

kolerigante kaj la esperantistojn, kaj la Aŭtoron mem de la originalo – kies morto, kvankam anoncita de Nietzsche, ne estas ankoraŭ konfirmita.

Tamen Lejzerowicz tion faras tiel respektive, ke kelkfoje lia parafrazo similas antaŭ ĉio piecan agon, kiu neniam vekis malamon aŭ akuzojn de la legantoj. Tio, ĉar *El la "Verda Biblio"* estas ja parafrazo – fakte de partoj de la Antikva Testamento – pere de kiu Lejzerowicz rakontas ne la historion de la hebrea, sed de la verda popolo, kiu “dise vivas vaste tra la mondo” (p. 33).

Ĉar pri ni mem la libro parolas, estus interese legi ĝin ja almenaŭ por koni nian propran historion: la kongresa etoso dum la intermilitaj periodoj, la akraj interorganizaj disputoj, la fiagoj kaj fiaskoj de tiuj, kiuj provis detrui kaj malstabiligi la movadon, kaj – malfeliĉe ankoraŭ aktuala – serioza kritiko al tiuj, kiuj konsideras sin eminentuloj. Tion la aŭtoro faras nerekte nomante la homojn sed parodiante iliajn nomojn, tiel, Teo Jung fariĝas Kafo Alt, kaj Andreo Ĉe, Andreo Apud. (István Ertl la samon faris en sia *Postdomo*). Tiusence, vere helpas al ni la notoj de la dua eldono, kiuj, kune kun la originalaj bildoj, estis represitaj en tiu



kvara. Estas notinde, ke nur unu nomo ne estas citita nek parodiita dum la tuta teksto: tiu de Zamenhof. En trafa, justa kaj ĝusta omaĝo, li estas la Spirito, kiu ĉion konstruis kaj fine ripozis en la sepa tago, “legante la originalan literaturon, kiun li faris kreante” (p.10).

Sed ne nur historia estas la valoro de ĉi tiu libro: estas eĉ pli grave analizi la stilon de Lejzerowicz, kiu ne nur vere lerte spegulas la stilon de la parafrazita teksto mem, sed, samtempe, kaj ne flankenlasante la lingvan korektecon, ĉie elmontras kiel stilo de aŭtoro povas esti variema, ĉar, ene de tiu parafrazo, kaj apud la

biblia tono, oni konstatas, ke el simpla laŭgeneza rakontado ĝis abundimaga laŭpsalma lirikismo, klare montriĝas la kreiva vervo de unusola aŭtoro. Fakte, la nura negativa noto de la tuta verko estas, ke la longeco de kelkaj ĉapitroj iom tedas, ĉar multaj vortoj kaj frazoj senĉese ripetiga; tamen, tio ŝuldiĝas ne al la talento de Lejzerowicz, sed al la originalo.

La kapablo de Lejzerowicz variigi sian stilon pli bone evidentiĝas kiam oni komparas la ĵus skizitan tekston kun tiu de *Babilado kun Horaĉo Serĉer*, aldonita jam en la tria eldono. Tiu eta perlo de nia rakontaro estis

inkluzivigita en ĉi tiu eldono, kaj se tiu “priskribo de movadmaniulo” estas tre interesa (vi certe rekonos iun!), ĝi ankaŭ iel estas iom ombrita de la antaŭa teksto, tamen ankaŭ ĝi estas leginda, des pli, ke atenta studemulo multon povas lerni de Lejzerowicz.

Tamen, mi ne povus fini ĉi tiun recenzon sen peti pardonon de Lejzerowicz, kie ajn ripozas tiu murdito en Treblinka; ĉar mi, teksante ĉi tiujn komentojn pri lia verko, tute kontraŭis lian nuran peton, faritan en la antaŭparolo de lia “senpretenda kaj frivola”, tamen grava, leg-enda kaj legend-a, biblio.

Unesko

Nemateriaj heredaĵoj

■ Mireille Grosjean,
Kun-prezidanto de SES

En la jaro 1978 Unesko, la filio de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo, lanĉis la programon «naturaj kaj kulturaj mondiaj heredaĵoj». En la naturaj heredaĵoj aperas belaj montoj kaj akvofaloj k.s.; en la kulturaj heredaĵoj aperas bibliotekoj, katedraloj, moskeoj, mezepokaj fortikaĵoj k.s. Ekzistas ankaŭ kategorio por «miksitaĵ» heredaĵoj, do iom naturaj kaj iom kulturaj; ekzemplo por tiu kategorio: la sovaĝa regiono de Tasmanio, sude de Aŭstralio, kie estas grotoj kun pratempaj homspuroj. Entute oni nombras pli ol mil mondajn heredaĵojn de Unesko tra la tuta mondo. La du ĵurasaj svisaj urboj La Chaux-de-Fonds kaj Le Locle, pro sia tipa arkitekturo por horloĝfarado, estas monda heredaĵo de Unesko.

Kutime unu heredaĵo situas en unu lando. Tamen en 2016 Unesko

decidis pri honorigo de la fama svisa arkitekto Le Corbusier, kiu naskiĝis en La Chaux-de-Fonds en 1887. Konstruaĵoj liaj situas en Svislando kompreneble, kaj en Francio, Germanio, Belgio, Barato, Japanio, Argentino.

En 1997 Unesko aldonis novan kategorion: «monda parola kaj nemateria heredaĵo». En tia listo aperas dancoj, poemoj de afrikaj rakontistoj, festivaloj, kapabloj de manlaboristoj, tipaj manĝaĵoj, muziko kaj similaj aferoj, kiuj ne restas videblaj, kiel monumento staras kaj restas videbla.

Ŝtatoj sekvas la ekzemplon de Unesko kaj starigas tiajn listojn je nacia nivelo. En Svislando ekzemple la nacia plado «fonduo» apartenas al la svisa nemateria heredaĵo. Same la kutimo de sketado sur la frostigita lago en Les Brenets. Same la fama svisa montara kanta tekniko «jodel» (jodli).

Pri Esperanto okazis grava paŝo en 2014: Pollando elektis «Esperanton kiel portilon de la Esperanta kulturo» kiel polan nematerian heredaĵon. La pola registaro honoris per tio la majstron Zamenhof, kiu naskiĝis kaj vivis en la teritorio de la nuna Pollando.

En Svislando la registaro decidis, ke proponoj povu veni el la kantonoj; tio fontas el la federa strukturo de tiu

etega lando centre de Eŭropo. Do la loĝantoj eksciis tra amaskomunikiloj, ke iu povas proponi ion, kompreneble laŭ klaraj kriterioj. Svisa Esperanto-Societo (SES), kies sidejo estas en La Chaux-de-Fonds, en la kantono Neuchâtel, proponis Esperanton al la kantona registaro. Argumentoj estis ne nur la sidejo de SES, sed ankaŭ la elstara kontribuo de du svisoj, Edmond Privat kaj Hector Hodler, en la vivo de nia Movado. La kantona komisiono esploris pri la valideco de tiu propono kaj de 3 aliaj. En decembro 2016 venis al SES anonco, ke la kantona registaro aprobis tiun proponon kaj transdonas ĝin al la ĉefurbo Berno, kie la svisa registaro devos decidi pri ĝi.

Do esperantistoj nun estas en atendo. Ĉu Svislando sekvas la ekzemplon de Pollando? Se Svislando kaj Pollando havos Esperanton en sia listo de nemateriaj heredaĵoj, ĉu aliaj Ŝtatoj sekvas, ĉu iam Unesko metos ĝin en la tutmondan liston? Esperantistoj esperas.





Turismo kaj evoluo: karavanaj vojoj al Seulo

Lastatempe pli kaj pli populariĝas tia formo de Esperanto-turismo, kiel karavanoj. Ĉi-jare al la Seula Universala Kongreso estas planataj kelkaj karavanoj. Intertempe tio ankaŭ kongruas kun la kongresa temo – “Turismo kaj evoluo: Vojoj al daŭripovo”.

La redakcio esploris du itinerojn de tiuj planataj vojaĝoj, kies plej granda parto de la vojo iras laŭ la Trasiberia fervojo, la plej longa fervojo en la mondo. Tamen tiuj karavanoj estas ege malsamaj kaj startas el diversaj urboj: la unua el Sankt-Peterburgo kaj la dua el Berlino.

Ni parolis kun s-ino Tatjana Loskutova kaj s-ro SO Gilsu. Ili estas la ĉeforganizantoj de tiuj ĉi karavanoj.

Revuo Esperanto: *Kiel kaj kiam venis al vi la ideo okazigi trajnkaravanon tra Rusio al la 102-a Universala Kongreso?*

S.G.: Kiam mi intencis partopreni en la 101-a UK, mi tuj decidis organizi la trajnkaravanon. kaj kiam mi ekplanis la planon, mi jam samtempe projektis la karavanon de la inversa vojo al la 102-a UK en Seulo.

Mi jam vojaĝis en 108 landoj tra 5 kontinentoj, kaj la trasiberia trajnveturado, kiun mi jam faris 3-foje de Kamĉatko ĝis Sankta Peterburgo, estis unu el la plej imponaj vojaĝoj, kion pruvas la Brita gazeto ‘Guardian’. Ĝi elektis “10 Mirindaĵojn de la Mondo” spertendajn por la junuloj je la aĝo 18-25. El ili troviĝas: “Traveturi Azion per la Siberia Fervojo: plene ĝui la sentimenton de la Azia kontinento ekde Pekino ĝis Sankta Peterburgo.”

T.L.: La ideo pri ĉi-jara E-karavano aperis tuj post la anonco de la UEA-estraro okazigi la 102-an UK-on en Seulo.

Revuo Esperanto: *Kiu(j)n ĉefa(j)n celo(j)n havas tia vojaĝo?*

T.L.: Laŭ mi tian vojaĝon eblas nomi siaspeca internacia turisma E-aranĝo, kiu havas du ĉefajn celojn, inter kiuj estas iom malfacile difini prioritatan. Ni, rusianoj, certe fieras pri la beleco kaj vasteco de nia lando, kaj ni ŝatus konatigi gesamideanojn veturontajn E-karavane kun kulturaj heredaĵoj kaj tradicioj de Rusio, kun ĝiaj vidindaĵoj, kiuj famas tutmonde. Memkompreneble, niaj gastoj ĉiam strebas konvinkiĝi propraokule pri multo, pri kio ili antaŭe aŭdis, legis



2007, renkonto en Vladivostok

aŭ televidis, kaj traveturi Rusion per la plej longa fervojo estas revo por multaj el ili. Aliflanke, praktika uzo de la lingvo Esperanto en internacia komunikado (por kelkaj gekaravananoj – bonega lingva trejnado!), renkontiĝoj kaj interŝanĝo de spertoj kaj kunestado kun diverslandaj geesperantistoj estas nepre kaj tre alloga fono de simila vojaĝo, kies fina punkto ĉi-foje estas Koreio, la lando de la UK.

S.G.: La celoj de nia karavano estas jenaj tri, el kiuj la dua estas la ĉefa.

1) Unu mondo: Eŭropo kaj Azio estas geografie malsamaj kontinentoj, sed jam estas sama zono de interkomunikiĝo en diversaj medioj.

2) Unu vojo ekde Berlino ĝis Seulo: la fera silkvojo kiel unu vojo tamen estas interrompita en Koreio, suda kaj norda.

Nia karavano celas trapasi la interrompitan vojon kun la deziro pri 'la paco kaj unuiĝo de Koreio' (1-a plano). La karavano flugos tra Pekino, se ni ne povus trapasi la rompitan vojon (2-a plano).

3) Unu lingvon ĉiuj uzas, kvankam la karavano trairas diversajn landojn. Tio estas nia tria celo. Mi ĉiam vojaĝas por kaj per Esperanto. En la lasta karavano de Seulo ĝis Berlino ni esperantumis en ĉiuj urboj kaj landoj. Mi tute ne komisiis la aferon al vojaĝagentejo, sed mi ĉiam kunlaboris kun lokaj esperantistoj, kiuj vere amike kaj anime helpis nian karavanon.

Revuo Esperanto: *La karavano estos internacia: esperantistoj el kiuj landoj estos reprezentitaj?*

S.G.: La karavano nomiĝas Eŭrazia, kaj aliĝis esperantistoj el Francio, Hispanio, Pollando, Japanio kaj Koreio.

T.L.: La ĉi-jara E-karavano estis anoncita sufiĉe frue: jam januare 2016 ni sukcesis krei retejon, kies enhavo vekis intereson de pluraj personoj el diversaj landoj. Meze de januaro 2017 la grupo de veturontoj jam formiĝis kaj nun ĝi konsistas el 39 personoj



2016, landlimo de Norda Koreio

(plena kupea vagono!), geesperantistoj de Belgio, Brazilo, Bulgario, Francio, Germanio, Rusio, Svislando kaj Usono.

Revuo Esperanto: *Ĉu laŭvoje estas planataj ankaŭ renkontiĝoj kun la lokaj esperantistoj?*

T.L.: La ellaborita itinero antaŭvidas tion. Geesperantistoj en Sankt-Peterburgo, Moskvo kaj Vladivostoko esprimis pretecon konatigi gekaravananojn kun vidindaĵoj de la urboj kaj nun aktive kaj antaŭĝoje prepariĝas al renkontoj kun eksterlandaj gastoj. Ankaŭ rusiaj geesperantistoj ŝatus veni saluti surkaje la gekaravananojn veturantajn tra la lando dum trajnhaltaj en certaj urboj.

S.G.: Esperantistoj en Berlino, Moskvo, Ulanbatoro, Pekino aranĝas por ni renkontiĝojn kaj ekskursojn.

Revuo Esperanto: *Kiujn malfacilaĵojn, kiuj povas okazi dumvoje, vi antaŭvidas?*

T.L.: Bonŝance, mi konas persone unu trionon de la grupo, kiuj estas spertaj geesperantistoj, agrablaj personoj. Tamen la multnacia, diversaĝa kaj grandnombra E-grupo estas relative malfacile organizebla: ne ĉiam deziroj de iuj personoj koincidas kun deziroj/ebloj de aliaj, oni neniam povas antaŭvidi kaj konkrete scii, kiel

reagos homoj de diversaj kulturoj al renkontataj eventoj en fremda lando, kiel ili kondutos en relative malvasta kompanio, des pli ke oni devas longtempe kunveturi kaj kunloĝi (en urbaj hoteloj, turisma bazejo ĉe la Bajkal-lago kaj vagonaj kupeoj, aparte menciindaj). Kaj tion endas antaŭvidi. Por eviti diversajn malfacilaĵojn ni klopodas jam nun tre zorgeme pretigi ĉiujn erojn de la vojaĝo, esplorante ankaŭ la opiniojn de la gekaravananoj pri kelkaj aspektoj de la vojaĝo per enketiloj.

Revuo Esperanto: *(demando al s-ro SO Gilsu) Kiel vi prognozas la ŝancojn de sukceso/malsukceso de via plano, ke la karavananoj provu iri tra Norda Koreio?*

S.G.: La plej kulmina punkto de nia karavano estas ĝuste viziti Nordan Koreion, kaj la problemo trapasi la landlimon de la du Koreioj estus la plej malfacila, kiu dependas de la politika situacio, ne de nia klopodo. Mirejo asertis, ke la procento de la sukceso trapasi estas nur 1%, kion mi mem bone komprenas. sed oni devas klopodi eĉ por tiu 1% da espero. Mi jam pretigis alian varianton veni al Seulo per flugo, kio tamen jam estas 50% da sukceso por helpi la pacon de la Korea Duoninsulo.



Revuo Esperanto: *(demando al s-ino Tatjana Loskutova) Kial la karavana grupo flugos el Vladivostoko al Seulo, sed ne uzos pramon?*

T.L.: La unua plano antaŭvidis ŝipumadon el Vladivostoko al Koreio. Post detalaj esploroj evidentiĝis, ke veturi prame estas certgrade pli koste kaj memkompreneble pli longdaŭre, ol flugi. Tamen la ĉefa kialo estis en la pramhoraro, kiu tute ne konvenas al la datoj de nia itinero kaj precipe al la tempobloj de la gekaravananoj.

Revuo Esperanto: *En antaŭaj jaroj vi jam okazigis similajn karavanojn. Ĉu vi povas kurte rakonti pri ili? Ĉu iuj spertoj de ili influos viziton aŭ neviziton de certaj lokoj laŭvoje kaj ĝeneralajn organizajn momentojn?*

S.G.: Mi tre bedaŭras, ke nia karavano ne povas viziti du rusajn urbojn, Ĵekaterinburgo kaj Novosibirsko, ĉar ni devis doni la tagojn por viziti Nordan Koreion. Fakte mi ankoraŭ pripensas viziti almenaŭ la urbon Ĵekaterinburgo, kie troviĝas la obelisko de du kontinentoj, kaj kie atendas bonaj esperantistoj. La lastan jaron mi vere ĝuis la gastamecon de esperantistoj en rusaj urboj.

T.L.: La ideo de E-karavanoj tra Rusio ne estas nova. En 1994 okazis IJK en Chonan (resp. Koreio) kaj tiam diverslandaj E-adeptoj karavanumis tra Rusio sub la gvido de nialandaj junaj geesperantistoj. Al renaskiĝo kaj efektiviĝo de E-karavanoj tra Rusio en 2007 «puŝis» konversacio kun la franca geedza E-paro Arlette kaj Edmond Plutniak kaj iliaj samlandanoj

grupo vizitinte Moskvon, Irkutskon/Bajkal-lagon kaj Vladivostokon ŝipumis laŭ la Japana maro al la kongreslando. En Japanio nin varme akceptis geesperantistoj el Niigata kaj ekskursigis nin tra siaj urbo kaj regiono. Poste ni ĉiuj busveturis al Jokohamo. Post la sukcesa E-Karavano 2007 (pri kiu aperis la libro de la nederlandano G.Berveling «*Vojaĝimpresoj el Siberio kaj*


“La plej kulmina punkto de nia karavano estas ĝuste viziti Nordan Koreion, kaj la problemo trapasi la landlimon de la du Koreoj estus la plej malfacila, kiu dependas de la politika situacio, ne de nia klopodo.”

post mia prelego dum la vica IF (www.internacia-festivalo.de) pri la trajnvojaĝo en Ĉinion al la UK (somere 2004), kiun mi kaj mia filino Maja, denaska esperantistino, faris por atingi Pekinon. Komence la propono pri la vojaĝo tra Rusio al Japanio neniel influis min – ja la priparolita UK okazos nur sekvajare. Tamen, iom post iom formiĝis deziro esplori eblojn veturi tra Siberio, des pli ĉar mi neniam (tiutempe) estis ĉe Bajkal-lago kaj en Vladivostok. Ankaŭ mara ŝipumado ŝajnis esti alloga... Do, tiel en 2007 estis organizita E-karavano tra Rusio kun 22 partoprenantoj el 6 landoj al la 92a UK en la japana Jokohamo. La

Japanio», 2008, kaj kelkaj aliaj artikoloj de partoprenintoj, kiuj priskribis siajn rememorojn sur paĝoj de diversaj E-periodaĵoj), estis organizita simila E-karavano junio 2010. Tiam la 26-persona internacia grupo trajnumis al Mongolio al la 6a Azia E-kongreso en Ulanbatoro. Survoje, krom Moskvon kaj Bajkal-lago, estis vizitita la urbo Krasnojarsk ĉe la rivero Jenisej, kie la gekaravananoj tre gastame akceptis lokaj geesperantistoj. Nia lando estas tre-tre granda kaj oni bezonas monatojn por vizitigi ĝiajn interesajn lokojn, tial ni elektas tiujn, kie niaj gastoj povos ricevi la plej pozitivajn kaj neforgeseblajn impresojn.

2016, La Berlina muro





Strategia prioritato de la Esperanto-movado: reta esperantista infrastrukturo

■ Dima Ŝevĉenko

Kio estas esperantista infrastrukturo? Esperanta Vikipedio alidirektas la terminon “Infrastrukturo” al la vorto “Substrukturo”, kio estas tamen erara. La reta PIV donas tute trafan formulon “Necesa ekonomia k organizo bazo de alte evoluinta ekonomio”. Do, tiamaniere ni povas supozi, ke esperantista infrastrukturo estas la sumo de ĉiuj servoj kaj ebloj, kiuj permesas al esperantistoj realigi plejparton de iliaj bezonoj, kiuj rilatas al Esperanto. Sen ĝi ne nur la movado, sed ankaŭ la lingvo mem ne povus ekzisti.

Por Esperanto, kiel lingvo kaj kiel movado, unu el la ĉefaj prioritatoj estas informado de la ekstera publiko kaj interŝanĝo de informoj inter esperantistoj. Nuntempe informado grandparte estas ligita kun la interreto kaj modernaj teknologioj.

“Admirante priesperantajn projektojn, kiuj estas sukcese realigataj, kadre de spacoj de neesperantistaj entreprenoj, estus granda eraro forgesi ankaŭ pri la propra reta infrastrukturo, kiun kreas la esperantistoj mem”

Dum la lastaj jaroj aperas multaj priesperantaj retprojektoj. Ili sendube ludas tre gravan rolon, kiu helpas pligrandigi la rekonon kaj disvastigi Esperanton tra la mondo. Admirante priesperantajn projektojn, kiuj estas sukcese realigataj, kadre de spacoj de neesperantistaj entreprenoj, estus granda eraro forgesi ankaŭ pri la propra reta infrastrukturo, kiun kreas la esperantistoj mem, ĉar tio povas kaŭzi grandajn strategiajn problemojn. Indas konscii, ke por esperantistoj la ĉefa celo estas apliki kaj disvastigi Esperanton, sed por la eksteraj grupoj kaj organizoj Esperanto povas esti nur rimedo por atingi proprajn celojn.

Unu el la lastatempaj tiaspecaj ekzemploj estas la “katastrofo” de Ipernity. Multaj esperantistoj aliĝis, kreis tie retan komunumon kaj aldonis tien multon da enhavo: fotojn, bildojn, artikolojn, diversajn historiajn dokumentojn, valorajn por la Esperanto-movado kma. La kvanto de tiu enhavo estis senprecedenca laŭ la koncentriĝo en unu loko kaj dum la difinita tempo, eĉ se taksu la tutan evoluon de la Esperanto-historio. Ŝanĝo de la reguloj ĉe Ipernity antaŭ iom da tempo, kaj poste, decembre de 2016, definitiva decido fermi la retejon estis granda bato al la Esperanto-kulturo kaj Esperanto ĝenerale. Oni parolas nun pri tio, ke tiu ĉi retejo ankoraŭ iom da tempo eble funkcios, sed la damaĝo, kiu estis farita por esperantistoj, estas jam ne forigebla. Ankaŭ indas konstati, ke la aliaj sociaj retoj, kiel ekzemple Facebook, kiu interalie same nun havas

esperantlingvan interfacon, kien migris plejparto de la Ipernity-membroj, ne plene taŭgas por interŝanĝi informojn inter esperantistoj, ĉar evidentas, ke prioritato de la retejo estas vendo de komerca reklamo. Ĉefe pro tio esperantistaj grupoj kaj asocioj havas tie signifajn teknikajn limigojn: ne eblas krei iun efikan sistemon de informado pri la eventoj kaj novaĵoj, samkiel ne eblas havi plenvvaloran kontakton kun la membroj kaj interesatoj. Tio kompreneblas, ĉar Facebook havas proprajn prioritatojn, kiuj povas ne kongrui kun la bezonoj de la esperantista infrastrukturo. Fakte eblas konstati,

ke tiel statas la aferoj kun preskaŭ ĉiuj pli-malpli konataj mondscale aŭ regione sociaj retoj – la teknikaj povas varii, sed la esenco estas la sama. Esperantistoj tie rajtas agadi, sed ili estas nur la gastoj kun striktaj limigoj. Uzantoj de Esperanto nepre bezonas havi proprajn retajn servojn, kiuj informas pri la novaĵoj, rilataj al la esperantista vivo; kie eblas trovi informojn pri la eventoj kaj aranĝoj, kiuj helpas trovi kontaktojn kaj komuniki; akiri librojn en Esperanto kaj aliajn rilatajn varojn; finfine lerni kaj progresigi Esperanton, lernigi la aliajn.

Tiajn servojn la esperantistoj devas krei mem, mankas iu preta solvo por tio, mankas iu “magia” rimedo, kiun eblas “enŝalti” por aŭtomate ricevi la rezulton. Ekzistas nun multaj modernaj teknologioj, kiujn indas saĝe apliki por akiri la konvenajn rezultojn.

Estas bone, ke UEA nun prioritatis evoluigon de retaj projektoj por esperantistoj kaj la ekstera publiko. Nun aperas multaj retejoj, kiujn kreas kaj subtenas UEA. Ankaŭ la aliaj Esperanto-organizoj, grupoj kaj unuopuloj laboras por krei strategiajn retajn projektojn kaj subteni la jam ekzistantajn. Tio signifas, ke UEA havas iusencan konkurencon, kiu stimulas ĝin krei pli ankaŭ bonkvalitajn kaj konkurkapablajn projektojn, subteni kaj kunlabori kun tiuj, kiuj ne apartenas al la Asocio.

Tre ĝojigas, ke UEA nun praktike paŝo post paŝo, ŝtupo post ŝtupo okupigas pri evoluigado de propraj retaj servoj, kiuj jam nun havas tre gravan rolon en la Esperanto-movado kaj en la estonto povos iĝi vera fundamenta bazo por la plua evoluo.



Subteno akumulita por Amikumu

La 16-an de novembro 2016 sukcese finiĝis la plej granda Esperanto-monkolekto per la interreto iam ajn. Pli ol 426 esperantistoj kaj poliglotoj donacis €26 671 al la nove proponita apo *Amikumu* - la elpensajo de la du plej bone konataj esperantistoj de la interreta generacio; Chuck Smith, la Esperantisto de la Jaro en 2015, kaj Richard Delamore (Evillea), la plej spektata Esperanto-filmisto ĉe JuTubo. Ni interparolas kun Richard:

Saluton, Richard, ĉu vi povas resumi kio estas Amikumu?

Tio estas apo [telefon-aplikaĵo] kiu celas helpi proksimajn lingvemulojn trovi kaj mesaĝi unu al la alia por organizi tujajn kunvenojn. La ideo de la apo fontas de niaj spertoj en Esperanto - precipe, kiel rekonigi esperantistojn surstrate, se ili ne havas verdan stelon. Nia devizo estas: 'Eltrovu kaj amikiĝu kun lingvemuloj apude - ĉiam, ĉie'.

Ĉu vi povas resumi kio okazis tuj post la monkolekto?

Ni planis la plej gravajn aferojn antaŭ la komenco de la monkolekto. Ni konsciis, ke neni fidus nin pri sia mono se ni ne prezentus planon. Laŭ nia eldona plano, ni fiksas januaron kiel la alfa-teston (baza funkcio), februaron kiel la beta-testadon (plena funkcio), marton kiel la Esperanto-lanĉeton kaj julion kiel la eldonon por ĉiuj lingvoj. Ĝis nun, ni plejparte sukcesigis nian planon. La alfa-testfazo finiĝis antaŭ kelkaj tagoj kaj la beta-testado komenciĝas komence de marto. Do laŭ mia kalkulo, niaj subtenantoj per *Kickstarter* jam ricevis alirojn al la apo antaŭ la apero de ĉi tiu intervjuo.

Kio okazis dum la lanĉeto?

Niaj programistoj preparis la plej bazajn funkciojn de la apo sen eksteraj belaj kaj aldonaj. Poste ni invitis limigitan aron de uzantoj (ĉirkaŭ 150) de la tuta mondo por testi kaj trovi la plej evidentajn 'cimojn'. Ni elektis kapablajn uzantojn el Amsterdamo, Sidneo, Novjorko kaj Ŝanhajo por testi la distancojn inter niaj uzantoj kaj la servilo. Multaj el tiuj uzantoj ankaŭ aktive partoprenas nian Telegraman grupon (alia pli frua projekto) kaj provizas nin per tujaj rekomendoj pri plibonigoj kaj problemoj.



Tamen, *Amikumu* estas pli ol simpla Esperanto-apo; ĝi estas tuta organizo, kiu devas sin subteni kaj kreski. Dum unu parto de nia teamo programas, la alia pritraktas la necesajn jurajn kaj financajn aferojn. Ni devas certigi, ke la afero povu daŭri kaj niaj uzantoj sentu sin protektataj kaj sekuraj.

Kio okazos dum la beta-testado?

Esence, ni malfermas la apon al niaj subtenantoj de *Kickstarter*. Tio signifas, ke la uzantaro ekhavas preskaŭ 400 novajn uzantojn. La apo havas ankoraŭ nur la plej bazajn funkciojn sed sen la plej evidentaj cimoj. Ni daŭre plibonigas ĝin kaj integras la promesitajn aldonajn funkciojn. Ni ankaŭ lanĉos nian novan retejon ĉe www.amikumu.com/eo kaj formale komencas nian reklam-kampanjon por sciigi kiel eble plej multe da esperantistoj pri nia apo por la E-eldono.

Kiel samideanoj povas helpi al Amikumu?

La plej facila maniero estas viziti nian retejon, www.amikumu.com/eo kaj abonon nian retliston. Tio certigas, ke vi ricevos ĝisdatigojn kaj anoncojn pri la apo kaj niaj sukcesoj. Alie, se vi volas pli aktive agadi por *Amikumu*, ni volas proponi kelkajn pliajn manierojn. Se vi gvidas lokan Esperanto-grupon, vi povas sciigi viajn membrojn pri ni. Kvankam ni jam multe publikigis informojn, ni konscias, ke multaj esperantistoj ne scias pri nia ekzisto. Se vi havas blogon, jutuban kanalon aŭ redaktas revuon, ni tre ŝatus paroli kun vi pri intervjuoj kaj aliaj kunlaborebloj. Laste, se vi aktive agadas por specifa lingvo en via loka komunumo, kaj volas helpi al *Amikumu* fariĝi sukcesa en via komunumo, eble la ambasadora programo plej taŭgas por vi. Kontakto nin ĉe richard@amikumu.com por diskuti tiun programon aŭ aliajn aferojn.

Oficiala Informilo

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA



DUMVIVAJ MEMBROJ

Ĉinio: Yonggen S.
Singapuro: D. Sivers.
Usono: H. Becklin.

SOCIETO ZAMENHOF

Belgio: K. Lödör, K. Tytgat.
Danio: T. Bak, A. Casper-Mortensen, T. Gregers, E. Hjorth, K. Jørgensen, S.F. Jørgensen, E.V. Mortensen, P. Wraae.
Finlando: O. Buller.
Francio: A. Andrieu, S. & H. Lafargue, D.M.H. & A. Loisel, C. Longue-Épée.
Japanio: Fukumoto H., Kuroyanagi Y., Kuzume S.
Usono: J. Kalilich.

PATRONOJ DE TEJO

Brazilo: M. Barcellos, M.A. Roncatti.

Finlando: M. Laamanen, T. Oittinen.
Francio: G. Darrieux, F. Dhersignerie, M. Gourichon, A. Loisel, A. Piella, L. Vignaud.
Japanio: Fukumoto H.
Usono: J. Schwartz.

DONACOJ

Ĝis la 5-a de marto
Konto Afriko
Brazilo: M. Barcellos 9,52.
Finlando: A-L. Ali-Simola 10,00.
Sumo ĉi-jara: 231,08.

Konto Novjorka Oficejo

Brazilo: M. Barcellos 95,24.
Sumo ĉi-jara: 95,24.

Fondaĵo Canuto

Brazilo: M. Barcellos 19,05.

Francio: J-J. Aumeunier, M. Castaing, F. Dhersignerie, A. Frangeul - po 50,00; G. Darrieux 100,00; M. Foucher 10,00; G. Massiey 11,00; S. van Landeghem 17,00; J-C. Trébouet 12,00.
Germanio: I. Gleitsmann 26,00.
Hispanio: L. Vázquez Souto 50,00.
Nederlando: W. Akkerman 25,00; R. Schmeits 10,00.
Sumo ĉi-jara: 1198,25.

Fondaĵo Junularo

Brazilo: A.M. da Costa Ribeiro 23,72.
Germanio: D. Bemann 984,65.
Sumo ĉi-jara: 3337,38.

Fondaĵo Partoprenu UK-on

Francio: A. Bertrand 20,00; G.

Darrieux 100,00; J-C. Trébouet 12,00.
Sumo ĉi-jara: 151,67.

Unesko kaj UN

Brazilo: M. Barcellos 27,62.
Sumo ĉi-jara: 27,62.

Volontula Fondaĵo

Brazilo: M. Barcellos 19,05.
Sumo ĉi-jara: 242,04.

Volontula Domo

Brazilo: M. Barcellos 47,62.
Sumo ĉi-jara: 259,62.

Ĝenerala kaso

Germanio: F.G. Rössler 10,00.
Greko: G. Papoulas 19,05.
Svedio: M. Milianowicz 9,50.
Svislando: C.C. Robin-Georget 27,50.
Div. malgrandaj: 4,00.
Sumo ĉi-jara: 436,02.



Apélété Agbolo,
togolanda esperantisto

De la 12-a ĝis la 16-a de septembro 2016 okazis ateliero pri kapabligho por membroj de la ewea Akademio, kiu okupiĝas pri firmigo de la ewea lingvo parolata sudparte de Togolando kaj unu el la ĉefaj lingvoj de la lando.

Al tiu ĉi seminario, mi estis invitita unue kiel kreanto de la hejmpaĝo de la ewea Akademio (Académie de la Langue Nationale Ewe – ALNE – www.academiewe.org – do kiel ilia konsilanto pri Teknikoj Informadikaj kaj Komunikadaj TIK – kaj due kiel observanto. La antaŭlastan tagon dum kurso pri neologismoj, mi faris proponon al la prezidanto pri la vorto “**taflo**”, uzata por *tabulo* kaj *tabelo*. Tiam mi proponis la sekvantan sistemon por diferencigi ambaŭ aferojn. (vd. la bildon).

Kvar monatojn poste mi bonŝance partoprenis la estraran kunsidon de la Akademio por proponi modifojn en la hejmpaĝo. Ankaŭ la kunsidon partoprenis la membroj de alia komisiono pri la programo “Instruado de Naciaj Afrikaj Lingvoj” (École et Langues Nationales en Afrique – ELAN) de “Francophonie – organizaĵo de francparolaj landoj”. Laŭ sia raporto, ili devas prezenti leksikon pri vortoj ne troviĝantaj en, ekzemple, la ewea lingvo, sed uzataj en la franca por enkonduki edukadon en naciaj lingvoj en bazajn lernejojn ekde 2018/2019. Mi uzis la okazon por memori la prezidanton pri mia iama propono pri la vorto “**taflo**”.

Li tuj eliris mian paperon el sia sako kaj petis min klarigi pri mia propono. Ĝoje mi tion faris kaj certe konvinkis la estraron kaj la komisionon, ĉar ili adoptis mian proponon kaj ĝi aperos en la venontaj vortaroj kaj lernolibroj de la ewea lingvo.

Antaŭ ol iri al mia propono, jen malgranda leksiko en la ewea rilate mian proponon.

Flu = streko / linio

Kpe = surfaco / skribtabulo

Mɔ = vojo

Taflo = Nigra tabulo

Tsitsitre = staranta

Tsoga = kruciĝanta / kruca

Xɔ = ĉambro

Go = ujo / skatolo


Xa = enkatenigi

Flukpe (flu-kpe) = Tabelo (surfaco kun strekoj)

Flumɔ = linivojo (signifanta vojon (aŭ spacon) inter du linioj aŭ strekoj)

Pri novaj radikoj (neologismoj) en la ewea lingvo

FLUKPE (tabelo)



Klarigo pri la propono:

Kiel mi alvenis al tio?

Unue, mi konvinkiĝis, ke uzi la saman vorton “**taflo**” por ĉu *tabulo* ĉu *tabelo* ne taŭgas por kompreni pri kio vere temas, ĉar se **taflo** = *nigra tabulo* venis al la ewea tra la franca “*tableau*” dum la kolonia periodo, la dua tute ne ekzistas kaj fakte ambaŭ ne ekzistis antaŭ tiu periodo. Do kiel diferencigi ambaŭ aferojn?

Mi unue iris al iu alia vorto “**nuɲɔkpe – nu-ɲɔ-kpe**” = *skribtabuleto*, kiu estas tableto, sur kiu per kredo lernantoj (almenaŭ en bazaj lernejoj) skribas. Do se oni desegnas liniojn sur tiu ĉi tabuleto, ĝi simple aspektos kiel tabelo.

Mia bazo estu “**kpe**” = *surfaco / skribtabuleto* kaj mi aldonu la striojn (liniojn) = **flu** kaj la tuto fariĝu “**FLUKPE**” = *tabelo*.

Nun ni nomu la diversajn elementojn, kiuj konsistigas tabelon:

Unue, *kolumno* kaj *linio* havus starpunktan nomon: **FLUMɔ** = *linivojo*. Ĉar ilin oni havas desegnante striojn, ĉu vertikale, ĉu horizontale.

Poste por ĉiu el ili, ni aldonu al la starpunkta nomo, ĝian pozicistaton:

- Ĉar kolumno havas starantan (vertikalan) staton (pozicion), do ni nomu ĝin: **flumɔ tsitsitre** = *staranta linivojo*
- Linio havas krucan (horizontalan) pozicion, do ĝi nomiĝu: **flumɔ tsoge (tsoga)** = *kruca linivojo*.
- La ĉeloj estas ĉambretoj kaj samtempe estas kiel ujoj aŭ skatoloj, do ni kunigu la vortojn *ĉambro* kaj *ujo/skatolo*. Tamen alia motivo estas, ke la simbolo [...] en la ewea nomiĝas **xadede dzezi** = *simbolo de enkatenigo, kaptilo*, ni povas uzi la vorton **xa** = *enkatenigi* apud la vorto **xɔ** = *ĉambro*. Tial *ĉelo* havu du nomojn, ambaŭ estu validaj: **XɔGOE**, **XɔXE** = *ĉelo*.

Tiujn ĉi klarigojn la Akademio unuanime aprobis kaj adoptis en januaro 2017 kaj ili eniros vortarojn kaj precipe lernolibrojn por la ELAN-programo.

La Morto en Venecio

■ Christoph Klawe

Thomas Mann: *La Morto en Venecio*.
FEL, Antverpeno, 2015. 80 p.
Prezo ĉe UEA: € 7,20

FEL eldonis en 2015 reviziitan version de la traduko fare de Piet Buijnsters.

La germana nobelpremiita aŭtoro Thomas Mann (1875–1955) verkis la faman novelon en la jaro 1911.

Ĝi temas pri la lastaj vivsemajnoj de la protagonisto Gustav von Aschenbach, pro siaj meritoj nobeligita, socie altestimata aŭtoro el Munkeno, Bavario. Pro la stranga aspekto de fremdulo dum printempa promeno subite akre, tamen nur neklare sentante la komencon de ekkadukiĝo de ne plu juna viro, li decidas forvojaĝi al pasinteco ŝatata loko, Venecio, por tie ĝui iom da ripozo, kiu en jam delonge pasintaj jaroj kutime refreŝigis lin. En la hotelo kaj sur la plaĝo kaptas lian atenton la aspekto kaj personeco de ĉirkaŭ dekkvarjaraĝa pola knabo, kiu tie ferias kune kun la patrino, guvernistino kaj tri fratinoj. Kvankam Aschenbach notas, ke la somera klimato de Venecio endanĝerigas lian sanon, post komenca decido pluvojaĝi aliloken li tamen restas en la urbo, ĉar li pli kaj pli estas entuziasmigata pro la nura ĉeesto kaj aspekto de la junulo, kiun li ekkonas kiel vivantan esencon de perfekta beleco kaj de la perdita juneco. Pro si mem iel hontante kaj al si mem tial preskaŭ ne konfesante tion, li komprenas, ke lia fascino pro Tadzio estas la plej sincera kaj pura – amo. Tadzio rimarkas la intereson de la fremda sinjoro, tamen rekta interagado krom nur singardema rideto deflanke de la junulo neniam okazas. Kosmetike rejunigita por ekstere alproksimiĝi al la sopirita juneco, Aschenbach hezitas

forlasi la urbon, kvankam intertempe kaŝe informita de kelkaj oficistoj, ke la kaŭzo de la okulfrapa malpleniĝo de la urbo malgraŭ la kulmino de la turisma sezono estas la disvastiĝo de ĥolero-epidemie, malkonfesa de la urba registaro. Ĉiutage observante kaj pli kaj pli serĉante la proksimecon de la platone amata knabo, Aschenbach,

“Ĉiukaze la traduko perfekte sukcesas rekrei la tre specialan kaj esencan etoson de la originala verko kaj tial estas ideala pordo al tiu majstroverko de Thomas Mann...”

suferante de kreskanta febro, neatentate mortas en plaĝseĝo dum liaj okuloj lastfoje ĝuas la grandiozon de Tadzio.

Nur surfaca kompreno de la novelo vidas en ĝi la nuran respeguliĝon de la malfacila sinteno de Thomas Mann rilate al siaj propraj samseksemaj inklinoj, kiuj ne libere povis esti revelaciitaj en la vivtempo de la aŭtoro.

La kerno de la rakonto vere estas la densa psikologia priskribo, pripensado de la dolora scio pri la propra kaduko, la ĝenerala kadukemo de la fizika mondo kaj la filozofia rilato inter la perfekta beleco kiel sopirita kulmino de eterna vivforto kaj ĝia respeguliĝo en perfekte bela korpo de knabo, jam idealo en la klasika Grekujo, kiu flanke estas menciita en la novelo, kiel tiu streĉado, kiu finfine generas puran arton.


Tiu ĉi jam en si mem esplorinda temo de la novelo estas ellaborita de Thomas Mann per perfekta literatura komponaĵo kun elegante kaj ritme fluantaj frazoj kaj per la ege admirinde nuancita lingvouzado, pro kiu la aŭtoro estas tiom fama. Speciale tiu lasta faras tradukon en fremdan lingvon, riska, kuraĝpostula entrepreno.

Releginte la nun denove presitan tradukon oni rajtas diri ke Piet Buijnsters, estrarano de Internacia Esperanto-Instituto en Hago, perfekte aplikis nian internacian lingvon tiucelen.

La nuanciĉeco de la lingvouzado de Thomas Mann ofte rezultas el la kombino de substantivo kun kelkfoje eĉ surpriza, nekutima kaj neatendita adjektivo: „ordentliche Anmut“ („orda gracieco“), „erbittertes Zerren“ („amarigita tirado“), „leichtfertige Ergebung“ („facilanima sindono“), por doni kelkajn ekzemplojn; kaj kompreneble estas

malfacilege tradukante reprodukti la perfektecon de la germana originalo. Plej ofte tio bonege sukcesas, kelkfoje tamen nur eblas per priskribaj esprimoj. En la originalo la partoj de la teksto estas disigitaj laŭ paragrafoj, ne apartaj ĉapitroj kiel en ĉi tiu FEL-eldono.

Ĉiukaze la traduko perfekte sukcesas rekrei la tre specialan kaj esencan etoson de la originala verko kaj tial estas ideala pordo al tiu majstroverko de Thomas Mann por ĉiuj tutmondaj samideanoj, kiuj ne povas ĝui ĝin rekte en la germana lingvo. Ege rekomendinda legaĵo.



Ĉu mi povas helpi vin?

■ Frank Lappe

La Interkultura Centro Herzberg (ICH) estas kleriga kaj plukleriga centro kaj de Germana Esperanto-Asocio (GEA) kaj de Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI). Krom kulturaj eventoj kaj lingvaj kursoj por ĉiuj niveloj, estas ofertataj ekde kelkaj jaroj semajnfinaj studsesioj, kiuj kunigas diversajn fakajn temojn sub unu ĉefa.

Je la fino de februaro okazis jam la 77-a studsesio, ĉi-foje la 1-a SMS: Studsesio pri Medicino kaj Sano, kiu konsistis el oficiala Unua Helpo (aŭ sukurado)-kurso fare de Frank Lappe, prelego pri sana nutrado fare de Cornelia Luszczek kaj komuna esploro de fakaj vortaroj kaj gazetoj, kiuj rilatas al la temo de la aranĝo, sub la gvido de la ICH-estraro.

Kiel enkonduko servis la salutmesaĝo al la partoprenantoj fare de d-ro Klawe, prezidanto de UMEA (Universala Medicina Esperanto-Asocio), en kiu li esprimis sian subtenon de tiu studsesio. Venontaj kunlaboradoj kun UMEA estas planataj.

Oni povus demandi: Ĉu havas iun sencon fari tian kurson esperantlingve? Ĉu iu el la partoprenantoj krius „helpon!“ aŭ komunikus esperantlingve en kazo de danĝero? Certe ne. Ili farus tion en sia gepatra lingvo, kompreneble. Sed ekzistas ja kelkaj eventoj, dum kiuj



la plej multaj homoj bezonas komunan lingvon, kiu estas Esperanto dum internaciaj kongresoj, ankaŭ dum grandaj naciaj kunvenoj, kiuj havas kutime gastojn el aliaj landoj.

Sed la plej grava argumento por tiaj kursoj estas, ke ĝi ne temas *pri* Esperanto, sed pri klerigo *per* Esperanto. Ĉiu lingvo taŭgas por tio, ĉar ĝi estas nur rimedo. Do temas ne nur pri la grava enhavo de la kurso sed ankaŭ pri agnosko de aferoj esperantlingve per la ŝtataj administraj, kio kutime estas ja malfacila. Tiumaniere oni povas montri, ke Esperanto taŭgas por ĉiuj aferoj.

Ekzistis ja fruaj kunlaboradoj kun la Ruĝa Kruco (1906, Bayol), sed ili ne estis daŭrigataj pro la unua mondmilito.

Jam dum la lasta ARKONES en Poznano okazis eta versio de tiu kurso, sed „nur“ pri vivsavaj rimedoj en urĝaj okazoj. Ĉi tiu kurseto taŭgis kiel unua provo, sed la nuna 9-hora kurso, dividita en du tagojn, estis premiero en Esperantujo, ĉar ĝi estas ŝtate agnoskata, pro tio, ke ĝi sekvas la fakajn, metodikajn kaj jurajn regulojn – la lingvo ne gravas. La atestilo

pri partoprenado aperas dulingve, kaj en Esperanto kaj en la germana.

En multaj landoj tiaj kursoj estas bezonataj por personoj, kiuj havas respondecojn pri aliaj homoj, ekzemple, trejnistoj, edukistoj, instruistoj ktp. Ankaŭ personoj, kiuj volas atingi kondukpermesilon, bezonas tion.

La instruenda faka enhavo aktualiga laŭ la medicina evoluo. Ne nur pro tio estas rekomendinde, ke oni refreŝigu sian konon regule, la alia grava kialo estas, ke oni forgesas la rimedojn. La ĉiutaga vivo kutime ja ne donas eblojn, per kiuj oni povas trejni sin pri la uzado de vivsavaj rimedoj – feliĉe.

La novaj helpantoj aplikis al la aliaj kelkajn bandaĝojn kaj ili sukcesis tre bone savi la vivon de la pupo kelkfoje, eĉ al la pupo kun mankantaj brakoj kaj gamboj.

Mi ŝuldas dankon ankaŭ al s-ro Kobbe, respondeculo pri klarigkursoj de la frankfurta ASB (Arbeiter-Samariter-Bund Deutschland, asocio pri sukurismo), kiu ebligis tiun kurson sen la kutimaj administraj malfacilaĵoj.

Espereble tiaj kursoj povos esti daŭrigataj estonte.



Esperanto-Mono

■ Walter Klag

René de Saussure naskiĝis la 17-an de marto 1868 en Ĝenevo. Lia frato Ferdinand, renoma lingvisto, ne volis viziti “malseriozan” Esperanto-kongreson kaj instigis René lerni tiun lingvon. Legante la kolofonon de Esperanto-gazeto, René rimarkis, ke la abonprezoj estas esprimitaj en diversaj valutoj. Li havis la ideon, ke pli facile estus uzi nur unu „neŭtralan” monsystemon „Inter-Mono” (IM). Se estas 10 valuto-kurzoj, oni devas ĉiutage elkalkuli dekoble $9 = 90$ kurzrilatojn. Uzante IM, oni bezonus nur dekoble $2 = 20$ kurzrilatojn.

1907 René publikigis sian projekton de universala monsystemo. Verŝajne el la franca vorto *espèces* (kontante pagi) li kreis la esprimon “Speso”. Por eviti onojn li difinis: Unu Spesmilo (Sm) = 10 Spescentoj = 100 Spesdekoj = 1000 Spesoj. La valoro de unu Sm estis tiam la sama kiel 0,733 g da pura oro, hodiaŭ ĉirkaŭ 30 €. Ĉar kelkaj valutoj estis ligitaj al la oro, oni povis facile kalkuli: 1 Sm = 2 britaj ŝilingoj = 1 rusa rublo = 0,5 usonaj dolaroj = 2,5 svisaj kaj francaj frankoj = 2,5 hispanaj pesetoj. Kelkaj britaj kaj svisaj bankoj oficiale uzis la Sm.

La germano Herbert Höveler loĝis en Britio kaj fondis en la jaro 1907 la Ĉekbankon Esperantistan, kiu oficiale uzis la Sm. En 1914 la banko havis 730 kontoposedantojn en 320 urboj el 43 landoj. Post la morto de la fondinto en 1918 la banko likvidiĝis.

En 1927 aperis paperaj Spesmiloj. La nominalaj valoroj estis duona Sm: 2, 5 kaj 10 Sm. Laŭ la surskribo la falsado estis leĝe punota.

Ekzistas du arĝentaj Spesmilaj moneroj (Albert Boon diras: medaloj aŭ pagomedaloj).

Ili konsistas el arĝento (11/12) kaj kupro (1/12). La diametroj estas 30 aŭ respektive 36 mm.

Hodiaŭ la 1-Spessmila kaj precipe la 2-Spessmila monero estas tre maloftaj kaj multekostaj objektoj por kolektantoj. Unu monero kostas inter 100 kaj 500 €. Ekzistas nur unu ora monero de 50 spesmiloj, donacita en 1913 dum la Universala Kongreso en Krakovo al d-ro Zamenhof. Eble tiu monero perdiĝis.

En 1942, ankoraŭ dum la Dua Mondmilito, fondiĝis en Nederlando Universala Ligo (UL). Tiu mondfederista organizaĵo estis malferma al ĉiuj, sendepende de la lingvo, tamen la oficiala lingvo estis Esperanto. La ĉefaj aktivuloj estis Julia Isbrücker (1887 – 1971), la vicprezidanto de UEA Johannes Rijk Gerardus Isbrücker (1889 – 1967) kaj Andreo Cseh [ĉe] (1895 – 1979). Por UL en 1960 la ŝtata monfarejo Rijk Munt en Utrecht preĝis monerojn kun la nominalaj valoroj 1 Stelo, 5 Steloj kaj 10 Steloj el respektive bronzo, latuno kaj kupro-nikelo. Sur tiuj moneroj aperas la jarindiko de 1959. La eldonkvantoj estis po 10 mil. En 1965

sekvis 25-stela monero: 1000 el kupro-nikelo por la cirkulado, 5000 el arĝento por la kolektistoj. 10 ekzempleroj estis preĝitaj el oro. La arĝentaj kostis po 8 usonajn dolarojn.

Oni eldonis ankaŭ paperajn Stelo-kuponojn. La Steloj estis tre taŭgaj por la transpago de malgrandaj monsumoj. Ankaŭ tiujn monerojn kaj kuponojn oni diligente kolektis.

Unue la valoro de la Stelo estis ligita al la prezo de unu kilogramo da pano, kiu kostis tiam 0,25 nederlandajn guldenojn. Poste oni plivalorigis la Stelon al 0,50 guldenoj. Fine la kurzo elkalkuliĝis per komplika formulo el la kurzoj de diversaj valutoj. Oni volis, ke la Stelo ne estu viktimo de la inflacio.

En la jaro 1993 Universala Ligo malfondiĝis. La restantaj monerojn UEA, FEL kaj IEI iom post iom vendis kiel memoraĵojn. La aktualaj prezoj estas inter 10 kaj 120 €.

Ĉirkaŭ 2012 oni preĝis plastajn Stelo-monerojn kun la nominalaj valoroj 1, 3 kaj 10 Steloj. Ili uziĝis en la gufujo de Internaciaj Junularaj Kongresoj. Ekzistas fejsbuka grupo “Stelaro”, kiu elkalkulas la Stelo-kurzon, en novembro 2014: 1 € = 4,189 Steloj.

En 2012 Albert Boon en Belgio fondis la Esperanto-Numismatikan Asocion (ENA), pri kiu troviĝas informoj en la Jarlibro de UEA. La membreco kaj la retgazeto “Esperanta Numismatiko”, kiu aperas kvarfoje en la jaro, estas senkostaj. Por membriĝi sufiĉas simpla retletero al bert.boon@skynet.be. Poste oni ricevas rete ĉiujn jam aperintajn numerojn de tiu gazeto, en kiu troviĝas multaj informoj, kiujn oni ne povas ricevi aŭ malfacile ricevas el aliaj fontoj. Tiu kreskanta faka asocio havas preskaŭ cent membrojn.

Okaze de la 150a naskiĝdatreveno de René de Saussure (1868 – 1943) aperos en 2018 la unua Stelo-monero el pura arĝento 999/1000. La nominalaj valoroj estos 100 Steloj, la maso unu unco, do 31,1 gramoj. Laŭ la arĝento-prezo (februaro 2017) 1 € = 5 Steloj.

Eventuale eldoniĝos pliaj nominalaj valoroj.



1-Stela
monero, averso



5-Stela
monero, averso



10-Stela
monero, averso



25-Stela
monero, averso

STELO-TABELO 2017

Nominalaj valoroj	Materialo; Maso de la monero; Diametro	Eldonjaro; Eldonkvanto	Plenvalora aŭ fidata monero	Valoro de la Ag en la mo- nero laŭ la aktuala kurzo
1 Stelo	Bronzo; 3,4 g; 20 mm	1959'; 10 000	Fidata	-
5 Steloj	Latuno; 5,0 g; 23,3 mm	1959'; 10 000	Fidata	-
10 Steloj	Cu - Ni; 9,0 g; 28 mm	1959'; 10 000	Fidata	-
25 Steloj	Cu-Ni 75-25; 19 g; 37,8 mm	1965; 1000	Fidata	-
25 Steloj	Ag 0,900; 25 g; 37,8 mm	1965; 5000	Fidata	12,28 € 22,5 g da Ag
25 Steloj	Au 0,983; 50 g"; 37,8 mm	1965; 10	-	-
1 Stelo; 3 Steloj; 10 Steloj	Plasto; ?; ?	2012; ?	Fidata	-
100 Steloj (projekto)	Ag 0,999; 31,1 g (1 unco); 37 mm	2018?; 1000?	Plenvalora, se la Stelo es- tos ligita al la Ag-kurzo	16,98 €
50 Steloj (projekto)	Ag 0,999; 15,6 g (½ unco); ?	2018?; 1000?	Plenvalora, se la Stelo es- tos ligita al la Ag-kurzo	8,49 €
1 Stelo; 5 Steloj; 10 Steloj (Projektoj)	Cu	2019?; 1000?	Fidata	-

Kurzoj*** 2017 02 16: 1 unco da Ag ... 16,98 €; 1 unco da Au ... 1 162,73 €

Ag = arĝento, Au = oro, Cu = kupro, Ni = nikelo, g = gramo.

La tri moneroj aperis nur en 1960; **Valoro de la oro en 2017 02 12: 1869,34 €; ***Sen AVI

Pliajn informojn vi povas ricevi ĉe la aŭtoro de tiu ĉi artikolo: Walter Klag, esperanto@chello.at

Ligoj: https://eo.wikipedia.org/wiki/Esperantismo_kaj_mono; <https://facebook.com/plastamono>; Pri ENA: <http://kolektado.esperanto.cc/ena>

Literaturo: Lawrence Mee: *La Stelo*. ISSN 0941-9306. 2003.

Hans Jankowski: *Esperantomono*. Ilustrita historio pri universala monsystemo. Germanio: Libera Esperanto-Asocio. 1994.

Neforgesebla, fruktodona kaj internacia Komuna staĝo de koreaj kaj tajvanaj esperantistoj

■ Reza Kheirkhah

Laŭ la propono de la korea grupo LLG, kiu de jaroj iniciatas komunajn staĝojn ekster kaj en Koreio, okazis kvar-taga staĝo en la urbo Pingtung en la sudo de Tajvano. Partoprenis 9 koreaj, 2 francaj kaj po 1 aŭstralia, kanada kaj irana esperantistoj, plus 19 tajvanaj esperantistoj kaj neesperantistoj, kiuj agadis de la 8-a ĝis la 13-a de februaro.

Ni okazigis diversajn programerojn instruajn, kulturajn kaj amuzajn, inkluzive prelegojn pri la ĉi-jara UK en Koreio, la ĉina novjaro, manĝo-etiketo de Koreio kaj Tajvano kaj cetere okazis kulturaj programeroj. Unu el tiuj eroj estis instruado de la korea, ĉina kaj tajvana lingvoj. Oni komparis tiujn lingvojn ankaŭ kun Esperanto. Alia vigliga programero estis instruo pri jogo de Yvonne Chen.

Kantado de tri-lingvaj kantoj tre amuzis la partoprenantojn. Esperantaj kartludoj multe helpis la komencantojn kaj eĉ progresantojn lerni kaj praktiki multajn vortojn.

Ne mankis ekskursoj: al la urbo Kaohsiung, la due plej granda urbo en Tajvano; al aborigena vilaĝo sur la monto Sandiman, kie oni spertis ĝiajn kantojn, dancojn kaj vivstilon kaj ankaŭ gustumis ĝian lokan manĝon, faris kolringojn el koloraj ŝtonoj.

Unu el la plej popularaj programeroj estis tinkturado: kolorigo de grandaj tukoj kun posta fiksado de la koloroj en bolanta akvo.

Unu vesperon en la hejmo de esperantisto pli ol 20 homoj kuiris koree kaj tajvane.

La programeroj okazis ĉefe ĉe la loka Komunuma Universitato, ĉe kiu dum 5 jaroj ni havas Esperanto-kurson.

La neforgeseblaj tagoj rapide pasis, sed restis profunda amikeco inter koreaj kaj tajvanaj esperantistoj, kiuj sin preparas por la baldaŭa Seula UK. Ĉi-jare partoprenos dek kelkaj el Tajvano, kaj tio estas rekordo por la tajvana movado. Aperis luksa broŝuro pri la aranĝo kun 64 p. da diversaj informoj kaj fotoj.

Sep koreaj esperantistoj daŭrigis la vojaĝon tra la oriento ĝis la nordo de Tajvano dum 6 tagoj, akompanate de la loka esperantistino Liru Chen, kiu estis la ĉefa motoro de tiu staĝo. Grave helpis per tradukado kaj interpretado Ingrid Chuang kaj prof. Cho (Abengo). Kore-flanke Lee Hyun-mi (Esther) kaj Lee Jung-hee (Hela) estis la ĉefaj motoroj.



Kalejdoskop

Esperanto dum Afrika Kultura Festo en Brazilo

Okazis unua Afrika Kultura Festo, la 19-an de februaro en la brazila urbo Kuritiba. Pli-malpli 800 partoprenantoj estis, inter kiuj ankaŭ kelkaj lokaj esperantistoj.



Ĉeestis la honora PEA (Paraná Esperanto-Asocio)-membro s-ro Ivan Colling. La festo estis organizita de Migranta Pastoralo de Kuritibo, de kiu mi estis unu el la organizantoj kaj kun la kunlaboro de PEA, kie Esperanto estis tre rimarkinda. Mi dediĉis unu kanton al virinoj: "Virino kiu gvidos la mondon". Ĉeestis partoprenantoj el dek landoj: Angolo, DR Kongo, Benino, Kameruno, Guineo-Bisaŭo, Niĝerio, Senegalo, Haitio, Kenjo kaj Brazilo.

Baldaŭ, la 18-an de marto, okazos la Esperanto-tago en Kuritibo.

■ Elizabet Nelly Masemi Mbembi

La unua Lingva Festivalo en Samara

12–19 de decembro 2016 en Samara Ŝtata Instituto de Kulturo (ŜŜIK) okazis la *Lingva Festivalo: Kulturo kaj Lingvo*, la unua LF en la urbo.

La projekton iniciatis kaj organizis la instituta katedro pri historio kaj teorio de kulturo kaj la Internacia lernejo por superaj kulturologiaj studoj (ILSKS) de ŜŜIK, asistate de kelkaj partneraj organizoj: Samara la regiona universala scienca biblioteko, la regiona Domo de interpopola

amikeco, la Centro de la germana lingvo ĉe la Samara universitato, la Lingvistika klubo "Mi estas poligloto" k.a.

Dum la festivala semajno ĉiutage estis prezentataj diversaj lingvoj de Rusio kaj aliaj landoj, abundis prelegoj, disputoj, koncertoj, konkursoj, kvizoj...

La 19-an de decembro la festivalon kronis la Tago de Esperanto. La direktoro de ILSKS prof. d-ro Vladimir I. Ionesov prelegis pri la temo "Esperanto en la nuntempa mondo", kion sekvis publika enkonduka leciono de la Lingvo Internacia.

Menciindas, ke ekde 2014 en la Samara Ŝtata Instituto de Kulturo prof. V.I. Ionesov gvidas la kurson "Bazoj de transkultura komunikado kaj esperantologio".

■ Anatoli Ivanov

Bratislavo bonvenigos en junio 2017 pli ol 300 poliglotojn el la tuta mondo!

Komence de junio (31.5.–4.6.2017) en la Ekonomika universitato de Bratislavo okazos monda evento: Poliglota kunveno (Polyglot Gathering), dum kiu ĉiujare renkontiĝas lingvoŝatantoj. Ili averaĝe scipovas ses lingvojn, kaj dum la aranĝo estas kutime aŭdi ankaŭ lingvojn, pri kiuj vi neniam aŭdis antaŭe.

La poliglotojn atendas 4 tagoj plenaj de prelegoj kaj prezentoj, dum kiuj la partoprenantoj kundividis sian sperton pri lingvolernado kaj traktos ankaŭ diversajn temojn, kiuj rilatas al lingvoj. Tamen ne temas pri formala konferenco, sed "renkontiĝo" en la laŭvorta signifo: la prelegojn akompanas interesa vespera programo, ekzemple plurlingvaj ludoj kaj kvizoj, multlingvaj koncertoj, internacia vespero kaj similaj. Surprize granda proporcio de la poliglotoj scipovas ankaŭ Esperanton.

PG ĝis nun okazadis unufoje jare en Berlino, organizate ĉefe de la esperantistoj Chuck Smith kaj Judith Meyer.

Ĉi-jare la organizantoj decidis kunlabori kun Lýdia Machová el Lingva mentorado (www.language-mento-ring.com), kiu helpas homojn lerni lingvojn per si mem, kaj Peter Baláž, kunordiganto de la organizo E@I, kiu staras malantaŭ multaj sukcesaj lingvolernaj retejoj, por transpreni la aranĝon al Bratislavo.

Polyglot Gathering

2017



■ Pli da informoj troveblas ĉe: www.polyglotbratislava.com/leo

Esperanto dum la 18-a Vilna Librofoiro

De la 23-a ĝis la 26-a de februaro en Vilno okazis la 18-a Vilna Librofoiro. Ĉi-jare pli ol 62 000 vizitantoj kaj 400 kulturaj renkontiĝoj. Ankaŭ Esperanto partoprenis en la librofoiro.



Aktive kunlaboris studentoj de la Vilna Universitato kaj Vilnaj esperantistoj: Mindaugas Žuromskas, Ieva Judickytė, Margarita Dautartienė kaj aliaj. Oni informis pri Esperanto kaj ĝia movado, oni vendis librojn, oni disdonis faldfoliojn kun konciza gramatiko de la internacia lingvo.

■ Gediminas Degėsys

LA MEMBRARO DE UEA EN 2016

Lando	AM	IM	Sume	Lando	AM	IM	Sume
Afganio	0	1	1	Kongo (Dem. Resp.)	50	7	57
Albanio	20	5	25	Kongo (Resp.)	0	3	3
Alĝerio	0	2	2	Korea Resp.	176	68	244
Angolo	0	1	1	Kostariko	15	5	20
Argentino	50	23	73	Kroatio	110	27	137
Armenio	25	6	31	Kubo	300	25	325
Aŭstralio	65	35	100	Latvio	83	13	96
Aŭstrio	46	47	93	Libano	0	1	1
Azerbajĝano	0	1	1	Litovio	115	33	148
Bangladeŝo	0	1	1	Luksemburgo	90	19	109
Barejno	0	1	1	Madagaskaro	25	3	28
Belgio	260	120	380	Makedonio	0	4	4
Belizo	0	1	1	Malavio	0	2	2
Benino	80	14	94	Malio	0	1	1
Belorusio	0	7	7	Malto	17	3	20
Birmo	0	1	1	Maroko	0	3	3
Bolivio	0	1	1	Meksiko	76	34	110
Bosnio-Hercegovino	100	6	106	Moldavio	0	1	1
Brazilo	121	281	402	Mongolio	25	1	26
Britio	299	102	401	Montenegro	0	1	1
Bulgario	120	28	148	Nederlando	123	199	322
Burundo	80	3	83	Nepalo	80	9	89
Ĉado	0	3	3	Niĝerio	25	5	30
Ĉeĥio	30	96	126	Niĝero	0	2	2
Ĉilio	25	6	31	Nikaragvo	0	10	10
Ĉinio	1051	80	1131	Norvegio	102	31	133
- Honkongo	0	2	2	Nov-Zelando	18	21	39
- Tajvano	0	5	5	Pakistano	60	20	80
Danio	82	77	159	Peruo	15	7	22
Dominika Resp.	0	2	2	Pollando	318	145	463
Ebur-Bordo	15	1	16	Portoriko	0	1	1
Egiptio	0	1	1	Portugalio	36	8	44
Ekvadoro	0	1	1	Ruando	0	2	2
Estonio	0	17	17	Rumanio	27	24	51
Etiopio	0	1	1	Rusio	90	67	157
Filipinoj	0	2	2	Salvadoro	0	1	1
Finnlando	156	87	243	Senegalo	0	3	3
Francio	241	429	670	Serbio	0	26	26
Ganao	0	3	3	Singapuro	0	1	1
Germanio	570	478	1048	Slovakio	63	56	119
Grekio	41	11	52	Slovenio	100	19	119
Gvatemalo	0	1	1	Srilanko	0	1	1
Hinda Unio	50	4	54	Sud-Afriko	23	8	31
Hispanio	144	125	269	Svazilando	0	1	1
Honduro	0	1	1	Svedio	263	92	355
Hungario	109	84	193	Svislando	123	76	199
Indonezio	0	18	18	Tagikio	25	2	27
Irano	19	34	53	Tajlando	0	4	4
Irlando	43	14	57	Tanzanio	0	10	10
Islando	25	12	37	Togolando	0	29	29
Israelo	95	60	155	Tunizio	0	2	2
Italio	648	162	810	Turkio	0	9	9
Japanio	731	317	1048	Ugando	0	3	3
Kamboĝo	0	2	2	Ukrainio	120	22	142
Kameruno	0	3	3	Unuiĝ. Arab. Emirlandoj	0	1	1
Kanado	74	61	135	Urugvajo	15	16	31
Kartvelio	25	1	26	Usono	346	243	589
Kazahio	0	4	4	Uzbekio	0	1	1
Kenjo	0	1	1	Venezuelo	25	3	28
Kirgizio	0	1	1	Vjetnamio	145	21	166
Kolombio	25	13	38	Zimbabvo	0	1	1
Komoroj	0	2	2	121 landoj	8689	4365	13054

LAŬKATEGORIA RESUMO DE LA MEMBRO-STATISTIKO

Kategorio	2015	2016
Membro-Gvidlibro	375	371
Membro-Jarlibro	2020	1384
Membro-Abonanto	1753	1341
Juna Membro-Gvidlibro	42	50
Juna Membro-Jarlibro	299	212
Juna Membro-Abonanto	62	61
Dumviva Membro	735	726
Juna Dumviva Membro	13	13
Dumviva Membro-Jarlibro	140	147
Juna Dumviva Membro-Jarlibro	15	17
Honora Membro	41	38
Honora Patrono	6	5

INDIVIDUAJ MEMBROJ **5501** **4365**

Aligitaj membroj	7742	7299
Junaj aligitaj membroj	1473	1390

MEMBROJ ENTUTE **14716** **13054**

Dumvivaj Patronoj	1	2
Societo Zamenhof	141	120
Abonoj <i>Esperanto</i>	89	83
Kolektivaj abonoj <i>Esperanto</i>	10	-
Abonoj <i>Kontakto</i>	227	194
Kolektivaj abonoj <i>Kontakto</i>	-	10
Patronoj de TEJO	61	67
Dumvivaj Patronoj de TEJO	23	23

KOTIZOJ ENTUTE **15278** **13653**

En 2016 UEA havis 4365 individuajn membrojn (IM), t.e. 1146 malpli ol en 2015. La malkreskon kaŭzis pluraj faktoroj, interalie la malgranda UK (1253 partoprenantoj kompare kun 2698 en 2015), la daŭra transiro al nova politiko rilate al Fondaĵo Canuto. Plej multe da IM liveris Germanio (478), Francio (429), Japanio (317), Brazilo (281) kaj Usono (240). Krom en la lando de nia plej nova landa asocio (Indonezio, +9) kaj en la kongreslando (Slovakio, +24) ne okazis menciinda kresko en la membraro, aliflanke signifa falo okazis en Francio (320), kiu gastigis la UK-on en 2015, kaj en Brazilo (-104), Japanio (-69), Ĉinio (-56), Rusio (-41). Tiuj ciferoj montras la gravecon kaj ligitecon de la Universala Kongreso kaj la landa ekonomia cirkonstanco al la membronombro de la Asocio. La falon signife influis ankaŭ, ke Fondaĵo Canuto pasintjare povis pagi la kotizojn de nur entute 348 (-364) membroj de UEA.

La nombro de aligitaj membroj (AM) malkreskis al 8689 (-526). Sekve la tuta UEA-membraro (AM + IM) estis 13054 (-1662).

El ĉiuj IM de UEA, 353 estis junaj (-78). La nombro de junaj AM estis 1390 (-83), tiel ke la tuta sumo de junaj membroj estis 1743 (-161).

